M. C. Butler.... Prezo 6p. (angla). Eld. B.E.A. La libreto enhavas ĉion necesan, por kapabligi al interesatoj legi kaj skribi simplan leteron. La ĉeftraĵoj de la lingvo estas trafe, nete prezentitaj, kaj la teknikistoj, per perfekta preso, majstre subtenis la instruaron de la aŭtoro. Celante nur skizon, li uzis malgrandan vortprovizon, do ne menciis, ekzemple, la diferencojn inter "nombro", "numero", "cifero", nek uzon de duoblaj prepozicioj (ekz., de sur).

Prononco: li ne instruas la sonon de EŬ—cetera neuzita en la libreto—nek AŬ, uzita ĉe proks. 23 vortoj. "Numero" mankas al la vortlisto.

Varbilo forte kaj fide rekomendinda. En ĝi kuŝas la distilita sperto de veterano, kiu instruis Esperanton jam de sia E-ĝo en 1905.—F.R.B.

VOJAĜO AL KAZOHINIO: de Sandor Szathmari, originalo en Esperanto. 318 p. Prezo 2.40 dol. Eld. S.A.T., 67 avenue Gambetta, Paris 20.

★ ★ ★

Estas imageble, ke kunlabore verkis ĝin Swift, Voltaire kaj Lanti, pere de medio s-ro Aldous Huxley. Sub formo de fabele kurioza aventurado, spicita de satira sarkasmo kaj mordanta mokemo, ĝi prezentas en sia unua duono socion pure racian, senpasian—kaj dubinde alcelindan.

Krom la super-evoluintaj hinoj—versajne pro kontrasto—ni esploras la vivon ankaŭ de iliaj subhomaj "fratoj", la oriemaj, putrapensaj behinoj, kies fi-frenezaĵoj logos aŭ naŭzos legantojn, laŭ ties diversaj konceptoj pri la moralo, aŭ forto-grado kontraŭ la ŝokiĝo.

La epidemio de verkoj spece de Brava Nova Mondo; 1984; Songe de Pomarbo, estas simptomo de la mal sano de nia generacio, tremanta antaŭ teknokratiaj kaj fi-sciencaj teruroj. Du kolosaj danĝeroj minacas la mondon: la senanimigo, aŭtomatigo, de la homoj, antaŭvide sklaviĝon sub giganta ŝtatarato; kaj, alternative, la fizika neniiĝo de ĉia vivo per bomboj globfrakasaj.

La hinoj, tamen, vivas ne sub depota regaparato, sed en idealeca anarĥio, kaj agas utilisme, senpaste, laŭ instinkto glatfunkcia. Kiel ili evoluiĝis ĝis tiu stadio? Kien plue ili direktiĝas? Neniu socio restas senŝanĝa.

Antaŭparole Kalocsay pridubas la dezirindon de tiu vivstato, ĉar "se ni plene ĝin atingus, ni ĉesus jam esti homoj" Diro vera! Kiel Baghy instruis per "Songe sub Pomarbo": Ne estas dezirinde, ke ankoraŭ malperfektaj homoj ne havu dezirojn. Senmotive statante, ili ĉesus havi ekzistokialon ekster la vegetaloj. Ni ankoraŭ plias!—Por sia sana evoluo ili bezonas ne nur dezirojn sed ankaŭ aspirojn edifajn—eĉ al neklare konceptataj celoj. Ĉu tiu aspiremo ple-

12-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

La samideanoj de Hobarto atendas vin ĉe la 12-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso. Aliĝu TUJ. Skribu al S-ino W. D. Shankley, 43 Victoria Esplanade, Bellerive, Tasmania.

nume satigos en la senfina estonteco, kiam la homoj eniros novan sferon, ricevos novan naturon, ĉe ia grandioza kulmino kosma? Al kia fincelo la homo eterne marŝas? Ĉu al konscia "absorbigo" en la Ĉiamkreaton, fonton de lia ekzisto? Pri tio longe luktos la metafiziko, kaj modeste meditos simpluloj, agitataj de misteraj intuoj kaj nenomeblaj movoj de l'spirito.

Je granda kosto kaj penado oni eldonis tiun verkon. Ĉapitro—Prezento de la Libro—rakontas ĝian mirindan historion, kaj mencias la antaŭvidemon de la genia aŭtoro, kiu implice aŭ eksplice profetis multon el la modernaj akiroj teknikaj.

La eldonintoj opiniis, ke la ĝenerala humana tendenco de la verko antaŭdestinas ĝin al Esperantaj legantoj, kiuj similidee trovos plaĉon per ĝiaj paĝoj.

Volonte ni kredus, ke la aŭtoro prezentas konstruan instruon, malgraŭ la drasta esprimformo de liaj bildoj, kaj lia foje cinika tono. Certe, la moderna menso bezonas ion pli stimulan ol pia nenidirajo; la nuntempa homo, sente-skuita per hororo, ĉiutage fakta, responde reagas jam nur al avertoj vivorte frazitaĵaj. La demando tamen restas: Ĉu efektive Szathmari kontribuas per tiu verko spiritan armilon al ni en epoko laŭte tion vokanta? Guos ĝin homoj jam ŝatantaj la spekulativon de Huxley, Orwell, Kafka k.s., kaj la klasikajn satirfabelojn de la 18-jarcentaj majstroj. Persistos ĝis la lasta paĝo ankaŭ soci - esplorantoj kapablantaj reagi ride al ĝia subtila sprito—pli apokrifa, sed ankaŭ pli signifa ol la banala popolhumoro.

Reviziita de Kalocsay, la teksto estas lingve bona kaj esprime klara. Nur ĝenas, post ioma legado, la sajne intencaj kontraŭencoj kaj vortaj mistifikoj propraj por romano de neordinara, eĉ stranga temo—la kolizio inter du mentaloj, tiu de brita ŝiprompiginto kaj tiu de sociojano kun tute alia pensirado. La aŭtoro uzas multe da propre-faritaj vortoj por indiki

lokajn aferojn, tiel donante lokan etoson au koloron al siaj vortbildoj: lanuko, betiko, bikruo, boeto, bivago, konao, anebo, k.t.p. Kreitaj por doni ian verŝajnecon al la rakonto, ili ne minacas niajn vortarojn. La kunteksto ilin klarigas.

Vasta imagopovo, brila denunco de socia stulto, sed al ĝi io mankas. La verkistoj devas fariĝi io pli signifa ol simplaj spegulantoj de la perfortemo kaj malinteligigo. Ili devas per siaj propraj pensostreĉoj regajni la inicon por la homa personeco kaj la kreaĵfortoj de la vivo, katenante la demonojn, kiujn ni lasis laŭvole diskuradi, kaj liberigante la anĝelojn kaj servantojn de l'graco, kiujn ni tiel fronte enkarcerigis.

La verkanto ankoraŭ devas esti faranto, kreanto; ne nur kronikanto de faktoj li estas, sed, antaŭ ĉio, interpretisto de la eblecoj. Li helpu per siaj di-donitaj intuoj nian civilizacion al komenco de nova ciklo de aventuro kaj penado. La verkisto devas trovi en si la tutecon, la integron, kiu nun mankas al la socio. Li devas redoni kuragon kaj alcelemon al la malvenkemuloj kaj senceluloj, esperon al la falintaj en malespron.

Ni sopiras la ekaperon de romano, poemo, dramo au filozofia verko, en kiu la entuteca homo fariĝos videbla, samklare videbla kiel la niatempa homo malintegriĝinta de "Ulysses", "Remembrance of Things Past" (Rememoro pri Pasintaĵoj). Tiu ankoraŭ nenaskita kreotulo fokusus en si la sanigajn fortojn, kiuj ankoraŭ restas en nia socio, kaj helpas al ni transcendi—unue en nova sistemo mensa kaj spirita, kaj poste en konkretaj, faktaj agoj—la katastrofojn, kiuj nun minacas la homaron.

Verkistoj venu el la latenteco en la potencon de l' realeco. Ili ĉesu pentri la dekadencan, haoson kaj putron, kaj male formu ideojn konstruajn kaj psike sanigajn. Ili faru verkojn, kiuj save surreligos la erarvagintan homaron kaj puŝos ĝin denove antaŭen.

—F. R. BANHAM.

The Australian Esperantist

("La Rondo")

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 10 (90).

MELBURNO.

Junio - Julio, 1959

POINTS TO PONDER

Among the dead languages only Latin could be envisaged as a possible international language. But think of the difficulty of learning it, and of its lack of modern terms. Even if it were simplified, and it adopted current expressions (helicopterum!) it would be doing only what Esperanto has done, and is doing, and it would remain withal a purely Romanic tongue, and therefore anything but international. At an examination for the licentiate, after seven years' study of the language five to seven hours a week the candidate in France is allowed three hours to translate three-quarters of a page of French into Latin. How long would he need to study it in order to speak it?

Among national tongues the choice would be from four or five of the most used European. But all national languages present grave difficulties. Even English, reputed to be the "easiest" (for whom?), has a pronunciation so involved that persons having learned it in different lati-

tudes cannot understand one another. As for its grammar, those who think this is reduced to a minimum should turn to standard textbooks on the subject, and to those who have studied them. Fowler in his "Manual of English Usage" has some 24 columns on "which" alone.

Furthermore, acceptance of one national language by the world's peoples as an auxiliary would give to the idiom a preponderance the effects of which would manifest themselves in the character and mode of thought of those using it; and the happy nationals whose mother tongue it was would be spared the time and energy of learning any other and could devote these to technical fields wherein the favored nation could move to mastery.

It is obvious that national amour-propre, and loss of cultural, commercial, technical and political advantage, would render impracticable the choice of a given country's language as a world medium.

TWELFTH AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

3-9 January, 1960, at Hobart.

JOIN NOW and reserve accommodation. Congress fee 25/- (include at least £3 for hotel deposit). Visit beautiful Tasmania during the Esperanto Congress. Congress Secretary: Mrs. W. D. Shankley, 43 Victoria Esplanade, Bellerive, Tasmania.

Only Esperanto remains. Its vocabulary is at least 70% of Latin origin, the rest Anglo-Saxon, Slav or other. Children of nine to ten could write and read it in a year, and speak it in two. Pupils of 10-14, after a year's tuition, reach a level markedly higher than that of their comrades who, with greater facilities, have studied a classical or national language; for, instead of burdening the memory, Esperanto, an instrument of logical expression, exercises the intelligence. By the fitting use of affixes, a word may be formed to clothe any idea with precision. A dictionary containing even an approximate number of forms made possible in Esperanto by this simple means would be five or six times bigger than one of any national language. For example, "kapo" with its derivatives and definitions occupies over seven dense columns in the dictionary of Webster.

Esperanto could well displace Latin in secondary studies. One has named it: "Latin logically and scientifically simplified". We add that its vocabulary is much more representative, because compiled from roots common to several languages.

Professor Collinson, of Liverpool University, has said: "Esperanto is a European language in which one senses the force of English, the profundity of German, the elegance of French and the pleasing resonance of Italian".

Australia Kroniko

(Sendu regule raportojn al la Sub-Redaktoro de ĉi-tiu rubriko, S-ro Herbert Koppel, ĉe A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne.)

● **BRISBANE:** La 16an de Marto alvenis en Brisbano, survoje al la Universala Kongreso en Pollando, S-ro W. H. King el Nov-Zelando. La Deligito aranĝis kunvenon en sia hejmo por ke kelke da samideanoj povu saluti la vojaĝanton. S-ro King jam ĉeestis Universalan Kongreson antaŭ 2 jaroj, kaj li intencas resti en Eŭropo ĝis post la Kongreso de 1960. —S.L.P.

A few figures: Thirty thousand publications have been issued in Esperanto, among them 2000 original works. A 640-page anthology of Esperanto poetry has been published in the Canary Islands. Technical dictionaries, some 110. The British Esperanto Association Library has registered well over 28,000 items, including more than 3000 complete gazette collections.

Chairs or lectorates of Esperanto in 31 universities in 12 lands. Thirty radio stations emit in Esperanto. Guide books in Esperanto have been issued by over 600 towns, aviation companies, &c.

Of 669 mayors who replied to an enquiry on their attitude to Esperanto and to a plan for positive steps to be taken to bring the language into wider international use, 586 (83.3%) were wholly favorable.

Some 2000-4000 people gather from many lands at the annual World Congress of Esperanto. Specialist congresses are held periodically in increasing numbers.

Esperanto is used in 82 countries; 2250 "consuls" in many places through the world serve anyone using Esperanto. They act for the Universal Esperanto Association, headquarters Rotterdam. This body is a consultative member of Unesco as from 1954, when the General Conference of Unesco at Montevideo recognised the aims of Esperanto to be in conformity with its own.—F.R.B.

● **MACKAY** (Q'ld): Bonan laboron faris lastatempe S-ano Neil Russell (antaŭe Rockhampton). Li estas instruisto en la loka gimnazio kaj nun gvidas tie klason kun 16 junaj studentoj, kiuj ŝajne studas E-on kun granda intereso.

Ricevinte de S-ro Ralph Harry ties pakajon pri la Centjara Jubileo, S-ro Russell bone agis laŭ ĉiu ero. Li sukcesis aperigi la artikolon en la loka gazeto, sekve de kio la loka Radio-Studio raportis detale en sia novjarservo kaj kelkaj jam demandis pri promesita kurso; la leterojn li sendis al eminentuloj en Mackay kaj Rock-

hampton; kaj la du ekzemplerojn de "Vivo de Zamenhof" li disponigis kiel jene: unu li transdonis al la bibliotekistino de la loka "School of Arts"-biblioteko, kiu ŝajne ĝojis ricevi, kaj la duan li sendis al samepeca biblioteko en Rockhampton.

● **ADELAIDE:** Kun ĝojo ni raportas, ke starigis nova kurso en Adelaide. Ĝin gvidas s-ro L. N. M. Newell, eks-redaktoro de "International Language". Lt.-Kol. D. Fulton, nia tre estimata pioniro, organizas ĝin. Regule kunvenas ses personoj. S-roj Fulton kaj Newell intencas, ke ĉi tiu kurso estu nur la unua el serio.

● **SYDNEY:** La 25an de Januaro ni bonvenigis F-inon Penny Ferguson, kiu freŝdate revenis hejmlanden post vizito al Eŭropo. Kiam ŝi eliris el Aŭstralio, ŝi ne sciis la Internacian Lingvon, sed, lerninte ĝin en Londono, ŝi ektrovis la grandan utilecon dum postaj veturadoj en Danlando, Germanujo kaj alie.

Nia socia kunveno de Februaro okazis en la Botanika Ĝardeno, kie ni babilis en Esperanto kaj diskutis malfacilajn punktojn de tradukado prezentitajn de S-ro Mueller-Sorau.—G.B.

En Marto okazis E-ista semajnfina ekskurso al Newport—loĝejo estis la W.E.A.-lernejo. Sabaton maŝene ni alvenis proksimume ja la deka horo. Ni preparis niajn litojn, kaj babilis ĝis la tagmanĝo. Poste ni havis kunvenon dum kiu ĉiu E-isto parolis pri la temo 'Kiel kaj kial mi fariĝis E-isto'. Ni estis liberaj ĝis la vespermanĝo, post kiu ni vidis kelkajn malfacilajn filmojn pri aliaj landoj. Dum libera dimanĉmateno kelkaj anoj promenis en la ĉirkaŭaĵo kaj aliaj (la plej granda parto) veturis en du plenplenaj aŭtomobiloj al Palmbeach. Ne-esperantista gasto, la Prezidanto de la Lingvaclub, forlasis nin post la tagmanĝo. (Rezulto: F-ino Edna Dash gvidas kurson en la Lingvaclub.) Posttagmeze okazis la ĉefa kunsido por ni klubmembroj. S-ro Chandler skizis la momente malfacilan situacion por nia klubo—perdo de ĉambro k.t.p.—kaj demandis kion ni povos fari por havi almenaŭ iom da sukceso dum Zamenhof-jaro. Sekvis diskuto kaj diversaj proponoj. S-ino G. Barlow raportis pri alparolo al la

Skoltoj.

Poste S-ro F. Mueller-Sorau kontaktis la junulargastejan movadon kaj faris paroladon tie. Li faris bonan impreson, sed ĝis nun ne starigis kurso.

Bonvole notu ke ni havas novan sekretariinon — F-inon Penny Ferguson, kiu, la kvaran de Majo, aranĝis publikan kunvenon en la Manly Evening College. Se ni sukcesos havi 12 lernantojn en la kurso, la vesperlernejo ĝin akceptos kaj pagos la instruiston; se ne, la kurso okazos en la hejmo de S-ino Duncan en Manly.—V.G.

● **CANBERRA:** En Aprilo malgranda sed entuziasma grupo kunvenis en la hejmo de D-ro Ross Robbins, en Wylde Strato, Narrabundah, por starigi novan kurson por komencantoj. La kurso daŭros proksimume 16 semajnojn. Ĉe la kutima Klubkunveno por Aprilo, unu programallogaĵo konsistis el kolorkliŝoj pri Nederlando kaj Indonezio kun komentarioj de S-ro S. Fulop kaj D-ro Ross Robbins. Aliaj programeroj inkluzivis magiaĵojn kaj komunan kantadon en Esperanto. Klubanoj bonvenigis vizitantan S-ron Ralph Harry, fondintan prezidinton, kiu nun loĝas en Melbourne.

Ĉe la Maja kunveno, S-ro N. Gamble denove montris kelkajn el la kolorkliŝoj faritaj dum sia vizito al Eŭropo por ĉeesti la U.E.A.-Kongreson en 1955. Li celis unuflanke instigi novajn anojn, kaj aliflanke adiaŭe informi malnovan, kiu vojaĝos Eŭropon ĉi-jare. Okazis ankaŭ diskuto pri kursoj kaj subteno de A.E.A. kaj U.E.A.—H. Torr.

● **MELBOURNE:** Je la 11a de Marto okazis nia ĉi-jara ĝenerala kunveno, en kiu elektigis la jena nova estraro:

Prezidanto: S-ro E. Mckenzie.

Vic-Prezidanto: S-ro W. J. Drummond.

Kasisto: S-ro H. M. Cohan.

Sekretariino: S-ino Irene Fink.

Estraranoj: S-ro Herbert Koppel, S-ro Stan Milligan.

Nia nova sekretariino, kiu jam el-laboris planojn por ĉi tiu Jubilea jaro, petis ĉiun membron al aktiva kunlaboro.

Je la 18a, Esperanto-kantojn sekvis S-ro H. Koppel per prelego pri Tasmanio kaj precipe pri Hobarto, urbo

de nia venonta Kongreso. Per la belaj kolorkliŝoj, kiujn li montris, li sukcesis instigi kelkajn al aliĝo al la Kongreso.

La norvega verkisto, Henrik Ibsen, estis la temo de informplena prelego (25/3) donita en la kutime vigla kaj neimitebla stilo de D-ro A. Fridenbergs.

Plua interesa kaj ĉiam bezonata prelego pri Esperanto-gramatiko de S-ro K. G. Linton estis bona komenco (Ian) por la aprila programo, al kiu kontribuis ankaŭ S-ro H. M. Cohen (8an) pri fama angle-naskita duon-nigrulo Samuel Coleridge-Taylor, komponisto. S-ro H. Koppel (15an), kies 'Mondvojaĝanto, Marco Polo', aldonis ankoraŭ unu al lia serio, 'Biografioj de Famaj Homoj'; Ges-roj S. Milligan, kiuj per mapoj kaj lumbildoj pri sia rondvetura vizito al Canberra kaj Sydney distris kaj la okulojn kaj la orelojn; kaj S-ro E. McKenzie pri "Agrikultura progreso en Aŭstralio".

Je la 6a de Majo S-ro Linton denove deĵoris per respondoj al 'Lingvaj Demandoj', kaj samvespere S-ro Koppel kontribuis per 'Novajoj el Esperantujo'. Nova parolanto je la 13a estis S-ro R. L. Cecil. Kvankam longtempa Klubano, li faris tiuvespere sian unuan kontribuon al niaj programoj, sed espereble ne la lastan. Lia traktato pri Daniel Home, mondfama spiritisto, estis bonege preparita kaj streĉe altenis nian atenton.

RENDEVUO: Sajne ne elĉerpebla fonto estas D-ro A. Fridenbergs, kiu provizis la programon en Marto, ĉi-foje el la Historio, pri Ghengis Khan, mezepoka venkinto en Azio. En Aprilo, F-ino V. Cox priskribis viziton al Nov-Zelando kaj renkontiĝon kun tieaj E-istoj, kaj por Majo S-ino I. Fink eltiris materialon por ankoraŭ unu informplena alparolo el sia pasinta restado en Maroko. 'La Korano, la sankta libro de la Islamanoj' estis ŝia temo.

Sekve de prelego al la Young Anglican Fellowship en Malvern (vidu la rubrikon "Centjara Jubileo") kelkaj junuloj deziris lerni Esperanton. S-ro Ralpr Harry nun gvidas klason en sia hejmo en kiu ankaŭ S-ino Harry kaj du el ŝiaj amikinoj partoprenas.

La pasintan jaron malgranda grupo en "Scotch College" komencis lerni Esperanton. La grupo ne havis instruiston, sed la melburna klubo donacis kelkajn librojn. La juna "estro" de tiu grupo vizitis S-ron Harry je la komenco de junio, por aŭskulti diskojn kaj konsulti pri la estonteco. La sekvantan semajnon li revenis kun du kamaradoj, aniĝis al U.E.A. kaj aĉetis diversajn librojn kaj insignojn.

CENTJARA JUBILEO

Prelegoj kaj Vizitoj.

La 3-an de majo la komisiito (S-ro Ralph Harry) prelegis ĉe kunveno aranĝita de la Baha'i Socio de Viktorio en la hejmo de Gesinjoroj J. N. Trueman, Mitcham. Sinjorino Trueman, prezentante la prelegonton substrekiis la subtenon de la Baha'i movado al Esperanto. La temo de la prelego estis "La Lingvo kiu Unuigas". Membroj de la melburna klubo bone propagandis inter la tridek ĉeestantoj, kaj kelkaj anoncis sin por kursoj.

La 7-an de majo la komisiito, vizitante Hobarton, alparolis la klubon en la Kvakera Lernejo pri aranĝoj por la Jubileo, antaŭ ĉio pri la venonta traktajkonkurso.

La 11-an kaj 12-an de majo la komisiito konsultis kun samideanoj en Adelaido. Li ankaŭ transdonis stokon de la ĵus presita speciala numero de "Australian Esperantist" kaj de diversaj jubilepropagandiloj.

La 12-an de majo la komisiito alparolis la "jubilean" klason en Perto, kaj la 13-an li raportis al plena kunveno de la Esperanto-Ligo de Okcidentaŭstralio.

La 20-an de majo, kaj la 17-an de junio la komisiito vizitis la klubon en Kanbero kaj informis ĝin pri la jubileaj aranĝoj. Li ankaŭ konsultis kun la klubanoj pri la planoj por internacia filmvespero.

La 7-an de junio la komisiito prelegis ĉe kunveno de Young Anglican Fellowship en la Preĝejo de Sankta Georgo en Malvern.

La 2-an de julio la Internacia Klubo de la Universitato de Melburno kunvenos por aŭskulti la komisiiton. La 8-an de julio li prelegos ĉe la Rotaria

Klubo de Melburno, kaj la 22-an ĉe la Rotaria Klubo de Malvern.

Speciala "Australian Esperantist".

La 20-paĝa, dukolora numero de "Australian Esperantist" aperis la 1-an de majo. Oni povis presi 3,000 ekzemplerojn dank'al la malavara ago de D-ro F. J. Williams, kiu mendis 1,000 ekzemplerojn por sia persona dissendado. Ĉar la unua eldono rapide elĉerpiĝis oni estas presinta duan eldonon de 2,000, en kiu oni enmetis artikolon pri S.A.T. kiu pro mis-kompreno mankis al la unua.

"Life of Zamenhof" kaj Bibliotekoj.

La komisiito dissendis ekzemplerojn de "Life of Zamenhof" al ĉiu klubo kaj U.E.A. delegito en Aŭstralio. Li sugestis, ke oni donacu ekzempleron al ĉiu surloka biblioteko kun la peto, ke la biblioteko mem aĉetu kelkajn librojn pri Zamenhof aŭ en Esperanto. Kelkaj kluboj jam sukcesis en tiu projekto. S-ro Towsey en Parkes same faris. Kelkaj ekzempleroj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la komisiito.

Gazetoj kaj Radio.

La 8-an de majo la "Nunawading Reporter" raportis pri la kunveno ĉe la Baha'ia Socio. Artikoleto verkita de la komisiito aperis la 11-an de majo en "The Canberra Times", kaj la 18-an de majo en "Crampion Post" de Parkes. "The Canberra Times" ankaŭ raportis pri aranĝoj por la internacia filmvespero de la Kanbera Esperanto-Klubo.

Antaŭ kelkaj semajnoj Rabbi Dr. R. Brasch prelegis per la tutlanda reto de A.B.C. Radio. La teksto de lia prelego, "Zamenhof and the Language of Hope" (Zamenhof kaj la Lingvo de Espero) aperis en "Hastings Deering's News" de junio.

Zamenhof-Fonduso.

La fonduso iom post iom pligrandiĝas. Listo de donacoj aperas aliloke en ĉi tiu numero.

Traktajkonkurso.

Ĉar S-ino Kirkwood (antaŭe Grace Barlow) ne plu povas daŭrigi sian laboron, la komisiito informos senpere kiel eble plej baldaŭ pri la reguloj.

C (TS) is pronounced as in the words Tsar, father. — P. 103 UEA jarlibro. Ĉu vere?

PRI LA A.E.A. PREZIDANTO

Raportinte pri la malavara donaco al nia Fonduso de S-ro Matasin, ni konstatis ke unu alia ja rajtas al speciala atento. Tiu estas nia A.E.A.-Prezidanto, D-ro F. Williams. Lia granda kontribuo al la Fonduso (£50) jam aperis en la unua listo. Tamen en tute li elspezis ĝis nun £125 por progresigi la aferon, kaj per sia mendo de 1,500 ekzempleroj de nia Speciala Eldono, li ne nur ebligis ĝian presadon, sed ankaŭ faras vastan propagandlaboron.

Krome per dispono de multhora laborado je la parto de sia sekretariino li ebligas la daŭran aperon de nia gazeto dum foresto en Anglujo de la Redaktoro, S-ro F. R. Banham.

Kun bedaŭro ni raportas, ke pro malsano nia Prezidanto devis rezigni portempe de aktiva laboro en la Melburna Klubo, sed espereble lia sanstato baldaŭ pliboniĝos kaj ni vidos lin denove en la Klubejo. Dume li daŭre dejoras kiel A.E.A.-Prezidanto.

ZAMENHOF FUND

5th JUBILEE HONOUR LIST

Sydney Esperanto Society...	£12	0	0
Dr. C. J. Caldera (Perth)	10	0	0
Mr. A. Feldmayr (Sydney)	7	13	0
Mrs. E. M. Dauber (Melbourne)	3	3	0
Mrs. E. K. Topham (Melbourne)	2	2	0
Messrs. Fitzgerald & Co. (Hobart)	2	2	0
Mrs. N. H. Smith (Kalgadoo, S.A.)	1	1	0
Mr. Heinz Koppel (Melb.)	1	0	0
Mrs. M. R. Robertson (Melbourne)	1	0	0
Miss Strong (Melb.)	1	0	0
Miss E. Styles (Rosebud, Vic.)	1	0	0
Father C. Sigismund (Qld.)	1	0	0
Mr. P. J. Brennan (Melb.)	10	6	
Mr. A. H. Harry (Melb.)	10	0	
Mrs. Long (Sydney)	5	0	
	£44	6	6
Previously acknowledged ...	638	5	0
TOTAL	£682	11	6

La unua E-a societo: Nurnberg 1888. La unua en Britujo: Keighley 1902. (La Suda Kruco, Dec. 1922.)

WORLD NEWS

MORE PAPERS IN ENGLISH AT UNO

Paris: The 'UNESCO House News' reports that there exists a tendency with UNO to publish more documents in English than in French. The cause lies in the fact that the reports of specialists are usually written by people whose first language is English, and that UNO has a house of assembly in an English-speaking country. The language discrimination has aroused disagreeable surprise in France.

TRANSLATIONS AND WORLD LITERATURE

According to 'Index Translationum' in 1954 there appeared 21,667 translations from the literature of the world. Against 7,498 translations from English, 3,874 were published from Russian and only 2,870 from French. Because the publishing houses can publish only translations that yield profit, important literature in languages not widespread remains unknown. A great step was undertaken by UNESCO to extend the work of translating also to other languages, but the rule of the 'strong' languages is very firmly implanted. Many observers of the phenomenon, who are also considering the conclusions of the last PEN-Congress in Tokio concerning the very small number of really qualified translators, chiefly from the eastern languages, are of the opinion that the most suitable solution would be to spread a knowledge of the chief works of national literatures by means of the International Language, Esperanto, or by retranslation from it.

Hundreds of Thousands of Esperanto Text-books in Russia:

Moscow: The publishing house of the Foreign Affairs Institute in Moscow announces that it is printing 200,000 copies of a Russian Esperanto text-book. The text-book, written by the well-known author, Ivan Sergiev, consists of three parts: 15 lessons with exercises, an anthology and an Esperanto - Russian vocabulary. 90,000 copies of an earlier text-book

sold out very rapidly: some tens of thousands of orders have already been received in advance for the new work.

★ ★ ★

U.N. Officials Learn Esperanto:

New York: According to information in "Secretariat News," the United Nations internal fortnightly gazette, two courses have been established for the international language, Esperanto, and these are attended by about 40 officials from 18 countries, among them several translators. As is known, on the occasion of Human Rights Day, the United Nations published a series of posters in Esperanto.

★ ★ ★

62 Spelling Errors by Napoleon III:

In Compiègne, at the Court of Empress Eugénie, wife of Napoleon III, famous French writer, Mérimé, in order to illustrate the difficulty of the French language concerning spelling, arranged for a dictation of French text to high-ranking people. The result was as follows: Napoleon III, 62 errors; the Empress, 45; Alexander Dumas (the famous novelist), 24. Today, Mérimé's dictation is still the symbol of an orthography impossible to master.

The First Museum for a Neolithic Ruin:

Peking: "El Popola Ĉinio", a fine cultural magazine printed in Esperanto in Peking, announces that, in the vicinity of Xi'an, capital of the province of Shanxi, a ruin of a complete little Neolithic village of five thousand years ago, has been unearthed. The whole, consisting of more than 40 houses and nearby caves, is being preserved in a hall of 2,300 square metres. Bigger objects, such as cooking utensils, urns for drawing water and clay pots for the burial of infants are preserved in their original position. The materials, including decaying partition walls, and the ground have been hardened by special processes with a view to preservation. They are to be covered with glass sheets.

Malaya Prefers to Learn Chinese Instead of English:

The Prime Minister of the Federation of Malaya, Tengku Abdulrahman, in a public address stressed that it was desirable that more Malaysians should study in Chinese schools and universities. For the future of the Federation of Malaya, the Prime Minister continued, it would be well for Malaysians also to study the Chinese language.

★ ★ ★

For the First Time: Classes for Esperanto in Albania:

Tirana: For the first time since the end of the war, classes for Esperanto have been started in Albania. The classes are held in the Philological Department of the University in Tirana, under the guidance of Mr. Remzi Fico, Dip.Eng., and in Himara, a seaside village in the south of Albania. An Esperanto-Albanian and Albanian - Esperanto dictionary is being compiled by the teacher, Janko Pala. Interest in the International language is showing considerable sudden growth also in Albania.

★ ★ ★

In Italy English was Threatening the Study of German:

"La Stampa," one of the most influential Italian magazines, reported that the Italian Ministry for Public Instruction, viewed with anxiety the continuous decline in the teaching of Spanish and German. Intermediate schools existed, the Ministry noted, where out of 30 different classes neither one of the two languages mentioned was represented. From the beginning of this year, classes in German and Spanish are compulsory in schools with more than 9 classes. Similar introductions has also been undertaken independently by School Principals. In Venice, several School Principals chose haphazardly the students who were to learn German from those who preferred to learn English.

"En la dua parto de la Angla Antologio ni esperas trovi ion el la verkoj de H. Belloc, G. K. Chesterton, G. Greene kaj E. Waugh". — "Espero Katolika".

12th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Date: 3-9 Jan., 1960, at Hobart.

Secretary: Mrs. W. D. Shankley, 41 Victoria Esplanade, Bellerive, Tas.

We are pleased to announce that the Lord Mayor of Hobart will give a reception for congress members with their wives or husbands on Monday, 4th January, 1960, at 3.30 p.m.

First List of Congress Members:

1. Dr. Fred Williams (Melbourne, (Supporting Member, £5).
2. Mr. Herbert Koppel (Melbourne, Supporting Member, £2).
3. Mrs. Fay Koppel (Melbourne).
4. Miss Amy Godfrey (Melbourne).
5. Mrs. A. Hintze (Melbourne).
6. Mrs. J. Blackmore (Hobart, Supporting Member, £5).
7. Mrs. A. Douglas (Hobart).
8. Mr. M. Leereveld (Hobart).
9. Mrs. A. Leereveld (Hobart).
10. Mr. G. Cooper (Hobart).
11. Mrs. G. Cooper (Hobart).
12. Mrs. M. Shankley (Hobart).
13. Miss Erika Shankley (Hobart).

Make your hotel reservation NOW as accommodation is limited!

HONESTE, NI PETAS

Ciu, asertante statistikon pri E-a agado en kiu ajn rondo, bone farus, se li citus fidindan aŭtoritaton. Tio estus multe pli konvinka ol ciferoj "prenitaj el la aero". Ni firme rekomendas al publiculoj uzadon de dokumentoj kompilitaj de la CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado), kiu laboras ĝuste por tiu celo—fidinda, honesta informado pri la aktuala stato de nia movado en ĉiuj kampoj. Ankaŭ rekomendindaj estas la Jarlibro kaj gazeto de la U.E.A.

Tiel agante, homoj ne riskus konfuzi legantojn, kiuj ekzemple trovas ("Sun", Melb., 12/2): "E-o estas instruata en pli ol 600 lernejoj fare de 7000 instruistoj", kaj en "La Gazeto": "... "142 lernejoj de la unua kaj dua gradoj en 22 landoj . . ."

D-ro Lapenna: "En la mondo estas almenaŭ 2000 E-instruistoj." Esperanto, Jan., '59.)

Antaŭ ol verki gravan artikolon pri E-o, oni certe kaj nepre havas moralan devon sin turni al CED, 77 Grasmere Av., Wembley, England, kaj ricevi ĝustan statistikon.—F.R.B.

Recenzoj

"MISTERO MINORA":

Ferenc Szilagy: Originala romano krim-psikologia. 128 p., 24 steloj. Eld. KOKO, Randbolvej 4, Copenhagen.

Szilagy sin movas en Esperanta mensomondo, perfekte ĉeĥejece en la lingvo. Simile al Auld kaj Lanti, E-o estas por li la plej supera esprimilo, kiel por la ĉiutagaja, tiel ankaŭ por la profunda penso. Sed lia literatura produkto postulas ĉe legantoj sentemon kaj simpation al lia variforma vasteco kaj spirita originaleco, por ke ili marŝu egaltakte kun lia idearo.

Por la triviala librulo li eksteratinge dancas en la nuboj de l'frazo fantazio; por la rafinita, kapabla, ekzemple, sin regali per Proust, li estas vera ĝuo.

Ĉi-verko estas brava provo konkretigi rican imagon. Oni povus tentiĝi al aserto, ke nur elito plene ĝuas sentos ĝian subtilon kaj sekvas ĝisfine la pensiradon. Ni tamen rekomendas la rimarkindan rakonton al sufiĉe ĝenerala legantaro, esperante, ke per ilia pacienca konsiderado, senteble kreskigos la nombro da kompetentaj taksantoj de nia pli supera verkado.—F.R.B.

FOLIOJ EL LA BILDOLIBRO DE DIO:

Martinus, el la dana originalo, 90 p. La sesa de serio. Mariendalsvej 94-96, Copenhagen, Denmark.

Tiu instituto estas la sola, kiu liveras en E-o fluon da libroj pri la homo, la kosmo, kaj la Kreanto. La verkoj pristudas didakte nian tripartan konsiston—karno, menso, spirito—nian esto-sencen kaj destinon, kaj la revelacian simbolismon de la natura mondo. Sub formo samtempe scienca kaj poezieca, la instruo anime similas la principan sintenon de aliaj skoloj, kiel ekzemple la teozofio, la Rozkruco, la Svedenborgianismo, la Antropozofio (de Steiner), sed propre originale interpretas mirindajn fenomenojn videblajn nur por homoj fundmeditaj pri "ĉiuj misteroj".

Multo instruata de Martinus ne forme aŭ fakte kongruas kun ortodoksaj dogmoj, tamen iuj kristanoj sentas simpation al liaj bazaj konceptoj kaj premisoj, per kiuj li honeste penadas kontraŭpezi la karnokulton kaj la cinikecon.

Poeto kaj filozofio, li strebas vekti en homoj la "sesan sentumon", kaj malfermi en ili la internajn okulojn, tiucele prezentante novan etikon, en kiu karno kaj spirito, la efemera kaj la eterna, la homa kaj la Dia, harmonie, racie videbliĝas en perfekta unueco kaj celkonformeco.—F.R.B.

12-a AŬSTRALIA ESPERANTO - KONGRESO

La samideanoj de Hobarto atendas vin ĉe la 12-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso. Aliĝu TUJ. Skribu al S-ino W. D. Shankley, 43 Victoria Esplanade, Bellerive, Tasmania.

POR VIN DISTRI

Ni ligas la formorton de E-aj societoj kaj la indiferenton pri E-o . . . kun televido. Ĝi minacas nian tutan kulturan vivon. La homo ne plu bezonas marŝadi, veturadi, aĉeti biletojn, nek longe atendi ĝis edzino aŭ fraŭlino finis sian tualeton; forfalas nervoziĝo pro multispecaj malagrablaĵoj atingi teatron, kinon, aŭ aliajn distrejojn. Oni sidas hejme pli komforte, libere, senzorge. Televido infektis ankaŭ niajn amikojn. Ĝi estas kontraŭulo de E-o, de nia societa vivo. Ni frontu la realon!—Laŭ "Sennaciulo".

Ĉu estas io pli malgaja ol laboro nefinita? Ho jes, amikoj karaj, kredu min—labor' nekomencita.—C. Rossetti.

"Libro estas iu ajn eldonaĵo, kiu entenas 50 aŭ pli multajn paĝojn. Eldonaĵo kun malpli ol 50 paĝoj estas broŝuro. La librovendistoj interkonsentis pri tiu cifero."—D-ro A. Mildwurf. Sed laŭ la dua difino en Plena Vortaro "broŝuro" estas "libro kungluita aŭ kunkudrita sed ne bindita". Tial eĉ la granda "Retoriko" nebindita—estas broŝuro.

The Australian Esperantist

("La Rondo")

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 11 (91).

MELBURNO.

Aŭg. - Sept., 1959.

MEN AND MACHINES

The Limitations of Science.

The modern world has an almost overwhelming belief in the capacity of science and technology to solve the problems which confront mankind. Nothing is impossible. There is no impenetrable mystery, provided enough money is devoted to research. There is nothing which cannot be made or achieved provided the necessary resources are made available. Such is the creed.

Yet even the most ardent scientist, the most convinced rationalist, must have nagging doubts. Is the conquest of time and space, the taming of the physical environment not creating new problems to which science has no answer? Is there not a limit to the value of economic analysis and psychological technique? Perhaps there are, after all, human relations which do not respond to the scientific method. Perhaps it would be wise to solve the problem of international understanding, if not before then at least simultaneously with the advance into outer space.

The limitations of science are nowhere better illustrated than in the

field of communications. The launching of earth satellites, the spread of television, the universal application of radio, the telephone and telegraph, intercontinental jet air routes and missiles have demonstrated the ingenuity of scientists and technicians and the organizing ability of businessmen. They have brought nation and nation, city and city, man and man into direct and instantaneous contact. They have made possible for a leader to speak simultaneously to hundreds of millions of people throughout his own country, and indeed to the citizens of other countries. Yet none of these inventions have broken through the language barrier which throughout history has divided one linguistic community from another. Science, or rather physical science, has failed to provide a means by which a man whose language is English or French can talk to a man who speaks Russian or Chinese.

The reader may be asking at this point: "But haven't they invented systems of simultaneous interpretation? I read the other day that they plan

12-a AŬSTRALIA ESPERANTO - KONGRESO

La samideanoj de Hobarto atendos vin ĉe la 12-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso. Aliĝu TUJ. Skribu al S-ino W. D. Shankley, 43 Victoria Esplanade, Bellerive, Tasmania.

to instal interpretation equipment in the new Opera House in Sydney. Surely that has solved the problem of languages at international conferences." Unfortunately no! These systems, whether based on telephone lines or on miniature radio transmitters and receivers merely convey the voice of the speaker to the interpreters and back from the interpreters to the audience. They speed up the process. They enable several interpretations into different languages to be made at the same time. But the human mind of the interpreter is still the essential link between the speaker and his hearer. If the interpreter fails to convey the meaning intended, or makes an actual mistake, the machine multiplies the error. The faster the process the more inadequate interpretation becomes, and the more difficult it is to detect and correct mistakes. Moreover the audience is fettered to the desks where the paraphernalia of earphones is located, or burdened with a walky-talky apiece. Simultaneous interpretation gives an illusion of efficient communication which is shattered once the poor delegate, encouraged to neglect the learning of languages, is severed from the machines and tries to talk informally with colleagues from other nations. He is as helpless as an aviator in mid-air without his aircraft. Gesticulation is a poor language parachute.

"Ah," we are told, "but the scientists are busy. They demonstrated the other day, at UNESCO, a translation machine which can translate French into English by electronic means. That will certainly put the translators out of business!" It is most unlikely. All honour to the technicians who built the electronic computer which "translated" the French text at the rate of 10,000 words an hour. But let us look at the facts. The computer cost 325 million francs (about £232,000 stg.). Officials of the company which staged the demonstration "apologised for the machine's complicated vocabulary" ("The Age," 17th June, 1959). Details of the experiment are not yet available, but we know that normally problems set for electronic computers must first be "coded" on to tape before being fed into the machine.

"The Art of Translation," describing a quite recent previous experiment, states that the endings of the words had first to be separated from the root. But let us assume that the problem of direct feed by "scanning" has been, or will be, solved. The results have still to be considered. Hitherto all such "translations" have emerged as a kind of code, e.g., Revenon's "a nos moutons" might be rendered: "Come back I pl to our sheep pl". It seems from the admission about the "complicated vocabulary" that the problem of translating simple statements, let alone idioms, still baffles our optimistic inventors. Assisted by competent human translators, a computer may well speed up immensely the task of searching for equivalent scientific terms in various languages. It may even, who knows, some day produce proper translations. An Australian inventor has developed a new computer part so small that it is theoretically possible to build an electronic computer as small as a human brain. Good on him!

The question remains, however, is this an efficient answer to the problem? Clearly no. Even if we could all be equipped with persistatron computers, the size of a transistor hearing aid, adjusted to translate all known languages, we should by this absurd "solution" be perpetuating, not removing, the language barrier. Ideas can be directly communicated, understanding fostered, warm friendships cemented, only if people speak the same language. The international language, Esperanto, is still the answer.

—R.L.H.

Australia Kroniko

(Sendu regule raportojn al la Sub-Redaktoro de ĉi-tiu rubriko, S-ro Herbert Koppel, ĉe A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne.)

● **SYDNEY:** La nova sekretariino de la Sidneja Societo certe laboras streĉe kaj laborigas ĉiujn por Esperanto. Se iu povos havigi respondon el la ŝtoneca brusto de Sidnejo, Penny Ferguson tiel meritos. Dum la pasintaj monatoj kelkaj gravaj evoluigoj okazis ĉi tie.

Publika kunveno en Manly alkondukis al starigo de klaso en la kadro de la Vespera Kolegio. Ĝi enhavas 14 membrojn kaj la instruistino, S-ino Marjorie Duncan, estas oficiale dungita de la Edukado Fakoj. Unu klasano estas la redaktoro de la ĵurnalo, "Manly Daily", kaj li multe helpas pri reklamado.

Alia klaso komenciĝis, gvidate de Fritz Mueller Sorau, en la hejmo de S-ino Pike, kiu estas entuziasma laborantino por la Pacmovado. La klaso de Edna Dash en la kadro de la Lingua Klubo ankoraŭ funkcias, kaj kelkaj membroj nun vizitas la Klubon.

Dimanĉon, 7an de Junio, la sekretario, Penny Ferguson, organizis kunvenon en la Sydney Domain. El tiu ni gajnis almenaŭ du komencantojn. Si organizis ankaŭ traktatan konkurson, por kiu la premio estas 10 senpagaj lecionoj. Jam alvenis kelkaj traktatoj.

En Wynyard Stacidomo oni nun vidas montrofenestron, kiu reklamas pri Esperanto kaj vekigas intereson inter la trapasantoj.

Ni devas raporti la malsaniĝon de F-ino Edna Dash dum kelkaj semajnoj. Nun ŝi resaniĝas, sed ŝi estis malsana pro pneumonio dum kelkaj semajnoj.

Dum Majo nia prezidantino edziniĝis kun S-ro Walter Kirkwood el vilaĝo apud Coffs Harbour. Por la nuna jaro tamen ŝia adreso restas same kiel antaŭe. Dum 1960 Ges-roj Kirkwood translokiĝos al sia hejmo en la kamparo.

● **ADELAIDE:** Dank' al la afableco de Sgt. "Curly" Innes, RAAF, Wagga, kiu disponigis al ni sian projekciilon kaj diapozitivojn, lokaj gesamideanoj dum marto ĝuis interesan lumbild-programon pri la "Festo de la ĉerizfloroj", kune kun bildoj de aliaj japanaj vidindaĵoj.

S-ro Ralph Harry dum Majo mallonge vizitis Adelaidon kaj kontaktis kelkajn samideanojn, kiuj certe ĝuis lian kunecon. Samtempe li liveris grandkvante ekzemplerojn de la speciala "Australian Esperantist", kiuj baldaŭ estis vaste donitaj.

2/5 F-ino Telfer, amatora pentristino, prezentis ekspozicion de sia artkolekto, pri kiu ŝi detale parolis. Evidentiĝis ke F-ino Telfer estas neordinare dotita en la pen-

troarto. 16/5 S-ro Fidge rakontis pri siaj spertoj en Melburno, kie li kaj lia edzino ĝuis naŭtagan ferion dum Aprilo, kaj vizitis la "Klubon" kaj la "Rendevuon". Ĉe pli posta kunveno, S-ro Fidge donis paroladeton pri bird-migrado. Dum Majo, samideano S-ino Potter, kaj ŝia edzo, surŝipiĝis por mondvojaĝo. Ni avide atendas ilian revenon.

S-ro Newell, kiu jam dum kelkaj monatoj gvidas klason ĉe la hejmo de Kolonelo Fulton, lastatempe doasis prelegon pri Esperanto ĉe la "Y's Men's Club" en Adelaido, kaj, laŭ raporto, li ricevis bonan akcepton. Ĉar li tiel bone parolis, oni invitis lin doni pluan prelegon pri iu alia temo je iu venonta dato.

Aperis en Adelaido - a ĵurnalo, "News", artikolo kiu raportis pri intervjuo kun D-ro Ross Robbins en Canberra kaj temis pri enkonduko de Esperanto en Sud-aŭstraliaj lernejoj. —H.W.F.

● **MELBOURNE:** La 27an de Majo F-ino A. Godfrey priskribis ankoraŭ unu ferimarŝadon kun, inter aliaj, historiaj interesaĵoj pri Ora Beechworth, urbo kiu devenis el la or-epoko de Viktorio, kaj apud kiu la marŝantoj starigis tendon. Sin subtenis F-ino S. Rosengrave per montrado de belaj de si mem faritaj kolorkliŝoj.

Sub la titolo 'Miaj Sekretoj', D-ro A. Fridenbergs komencis la programon por Junio (3an). El la 'Sekretoj' ni lernis kiel tiu farigis tiel altstatura, fortaspekta kaj ŝajne bonsana homo. Kial li ekstudis la temon li klarigis, kaj poste kelkajn ekzercojn el la Jogienco li montris. Vere mirigis nin la bildo, kiun li prezentis starante renversite, subtenate per la manoj kiuj tenis, unu la sidejon, la alia la la dorson, de seĝo. Ke viro de ties aĝo (pri kiu ni tamen silentas) povas ankoraŭ tion fari estas bona reklamo por la scienco.

Je la 10a de Junio, S-ro H. Koppel aldonis du pluajn 'Biografiojn De Famaj Homoj', el kiuj ni lernis iom pri Benvenuto Cellini, itala orajisto kaj skulptisto de la 16a jarcento, kaj pri Giuseppe Garibaldi (1807-82) kiu dediĉis sian vivon al la liberigo kaj unuigo de Italujo.

Speciala Amuzvespero, aranĝita de S-ino I. Fink, konsistigis la programon por la 17a de Junio. Ciuj parto-

prenis en ludoj, konkursoj, demandaro, ktp.; kaj ĉiuj ankaŭ ĝuis la manĝeton per kiu la gaja vespero finiĝis.

Per interesa historio pri tinkturoj kaj detala priskribo de la nuntempa 'Tinkturado de Ledo' S-ro E. McKenzie plenumis sian devon kiel parolanto je la 24a kaj lasta kunveno de la monato.

Estas interese noti, ke ja la 3a de Junio, S-ro Koppel starigis (ĉe McEwan House) novan kurson por komencantoj, kiu daŭros proksimume ĝis Novembro, kaj por kiu sin prezentis 10 lernantoj.

Laŭ la maniero de kelkaj radio-programoj, S-ro K. Linton gvidis (1/7) demandaron, bonan distradon en kiu ĉiuj partoprenis, kaj el kiu ĉiuj lernis, inter aliaj, ke multe restas por lerni pri nia lingvo. 'Venkinto de sia sorto' estis la temo de parolado de S-ro H. M. Cohen (8/7), kiam li rakontis la historion de Mary Reiby, kiu alvenis en Aŭstralio kiel punlaboristino kaj poste sukcesis starigi gravan komercon kaj fariĝis elstara civitano, kies familian nomon nun honorigas unu strato en Sidnejo. Malĝojiga informo en U.E.A. Jarlibro instigis la temon de alparolo de D-ro Fridenbergs (13/7)—'Nekrologoj'. La tempo sufiĉis por nur du. Unue traktata estis Leonid Vasiljev, antaŭa rusa militkaptito, kiu restis en Danujo kaj, post la dua mondmilito, helpis ke nia parolanto trovu tie novan, portempan hejmon. La alia estis Oscar Bunemann, antaŭa prezidanto de la E-Klubo en Hamburg. Ankaŭ ĉi tiu estis persone konata al la parolanto.

RENDEVUO: Kiel last-minuta anstataŭilo por la Junia kunveno S-ro H. Koppel alĉerpis interesaĵojn el siaj dummilitaj jaroj en Kanado.

PYKE MEMORIAL EXAMINATION

The examination will take place, as usual, in November, by which time our Examiner, Mr. F. R. Banham, will have returned from his trip overseas. Students who have studied Esperanto for not longer than one year are eligible for the prize of £5/5/-, but all may compete for the Certificate, which is, of course, also

awarded to the prize-winner. Club secretaries and teachers are asked to communicate this announcement to students and to submit names of participants to Mr. F. R. Banham, 2 Banchory Street, Essendon, W.3, by the end of October.

IMITINDA EKZEMPLO

Lastnumere ni raportis ke nia fervora samideano, Patro Sigismund, faris donacon al la Zamenhof-Fonduso (cetere la unua donaco el Kvinlando). Lia donaco estas des pli rimarkinda ĉar li, kiel katolika pastro, ne disponas pri persona havaĵo. Hodiaŭ ni ĝojas raporti ke li faris ankaŭ alvokon kaj monkolekton inter siaj kongregaciaĵoj en la Bowen Hills Preĝejo, sekve de kiu li transsendis al la Fonduso la sumon de £4. Lia agado por nia celo estu instigo por tiuj inter ni kiuj aŭ en propra eklezia rondo aŭ en aliaj kluboj aŭ inter propraj parencoj kaj amikoj povos varbi por nia Fonduso.

ZAMENHOF FUND

6th JUBILEE HONOUR LIST

Mrs. J. Chaldjian (Melbourne)	£10 10 0
Mrs. Grace Kirkwood (Sydney)	5 5 0
Sydney Esperanto Society (2nd Donation)	5 0 0
Mr. Ralph Harry (for Canberra)	5 0 0
Collection by Father Sigismund at Catholic Presbytery, Bowen Hills (Queensland) — H. Maliszewska, £1; Cimzereth, £1; M. Young, 10/-; N. Settel, 10/-; Dr. B. Rappaport, 10/-; H. Hulak, 10/-	4 0 0
Mr. F. Mueller - Sorau (Sydney)	2 0 0
Mr. J. M. Murray (Melbourne)	1 0 0
Miss V. Newnham (Melb.) (2nd Donation)	1 0 0
Mr. W. M. Pearson (Sydney)	5 0
	<hr/>
	£34 0 0
Previously acknowledged	682 11 6
	<hr/>
TOTAL	£716 11 6

ZAMENHOF CENTJARA JUBILEO

En apuda kolono estas anonco pri la antaŭlasta ero sur la programo de la Jubileo — la traktajkonkurso por niaj infanoj. La anonco estas sendita, dum la monato Julio, al 25 lernejestroj kaj instruistoj. Ĝi kreis multe da intereso en la du lernejoj el kiuj alvenis raportoj — Lauriston kaj Wadhurst. La estro de Wadhurst dankis al la Komisiito kaj la lingvoinstruisto atentigis la knabojn pri la konkurso. La estrino de Lauriston anoncis pri la konkurso en la plena asembleo de la lernejo. Ŝi aĉetis lernolibron por la lerneja biblioteko kaj mendis ekzemplerojn de "Australian Esperantist". Raportoj el aliaj lernejoj estas atendataj. Ĉiuj samideanoj estas petataj disvastigi la informon pri la konkurso. Kopioj de la kondiĉoj estas haveblaj ĉe la Komisiito por disdonado.

Pri la lasta kaj plej grava ero . . . la Specialaj Zamenhof-Festoj ni anoncas sube, kaj urĝe petas ĉiujn klubojn, grupojn kaj unuopajn samideanojn fari sian plejbonan por taŭge festi dum la Centjara Jubileo.

Kompreneble ĉiuj projektoj jam komencitaj, t.e. prelegoj, dissendado de la Speciala Numero, donacoj de "Vivo de Zamenhof", kolektado de mono por la fonduso, k.t.p. daŭros ĝis la fino de la jaro. La Komisiito S-ro Ralph Harry prelegis la 22-an de julio al la Rotaria Klubo de Malvern, kaj la 7-an de aŭgusto al la Internacia Klubo de la Universitato de Melbourne.

NI PREPARU LA ZAMENHOF - FESTOJN

Ĝekaj kluboj jam komencis preparojn por la Jubileaj Zamenhof-Festoj. La Melburna Klubo estas luita "Y.W.C.A. Memorial Hall", kiu povas enteni 200 ĉeestantojn. Programo estas planita, kun profesiaj artistoj, aldonita al prelegoj, deklamado k.t.p. La Klubo instigas ĉiujn membrojn ne nur ĉeesti la Feston, la 15-an de Decembro, ne nur vendi biletojn al amikoj, sed ankaŭ prepari sin por la Festo per ĉeesto en la Klubo dum la antaŭa monato, kiam oni ekzercos

kantante "La Esperon", kaj eble aliajn kantojn. Ni esperas ke aliaj Kluboj organizos similan "Zamenhof - Monaton". Ĉi tiun jaron, kiam ni invitas la publikon kunhonorigi la Majstron, ni estu bona ekzemplo, ni estu pretaj. La monatoj Novembro kaj Decembro, 1959, estu rememorindaj monatoj, kiam nia fido kaj nia ardeco estos renovigitaj.

ESSAY CONTEST

To celebrate the Centenary of the birth of Dr. L. L. Zamenhof, author of Esperanto, an essay contest is open to competitors from any part of Australia.

SUBJECTS, AGES, PRIZES

Junior (under 12 years on 1st Jan., 1959).

"Why We Need an International Language" (800 words or more). First prize, £3/3/-; second, £2/2/-; third, £1/1/-.

Senior (under 16 years on 1st Jan., 1959):

"The Life and Work of Zamenhof" (1200 words or more). First prize, £5/5/-; second, £3/3/-; third, £1/1/-. Publications on the life of Zamenhof are available from the Association (for address see below under "Entries") on request accompanied by 1/- in stamps.

Entries:

Entries must be typed or written in English on one side of the paper, marked "Junior" or "Senior", and signed with a pen-name only. Each entry must have with it a sealed envelope containing the pen-name, full name and address, date of birth, and a certificate by a parent or teacher that the essay is the competitor's unaided work.

Entries addressed "CENTENARY ESSAY", Australian Esperanto Association, Box 2122T, Elizabeth Street P.O., Melbourne, Victoria, must be received not later than Monday, 30th November, 1959.

Prize-winning entries will be the property of the Association and may be published by it. Unsuccessful entries will be returned if accompanied by a stamped envelope.

Judging and Presentation of Prizes:

Judges for the contest will be the President of the Australian Esperanto

Association, Dr. Fred Williams, and the Centenary Organizer, Mr. Ralph Harry.

Successful competitors will be invited to receive their prizes at Zamenhof Festivals in December or at the Australian Esperanto Congress in Hobart (3rd-9th January, 1960).

Results and the judges' report will also be published in "The Australian Esperantist".

12th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Date: 3rd-9th January, 1960, at Hobart.

Secretary: Mrs. W. D. Shankley, 43 Victoria Esplanade, Bellerive, Tas.

Tentative Programme:

The Congress will be held in The Preparatory School Hall, The Friends' School (393 Argyle Street), Hobart.

Sunday (3/1/1960)—2.30 p.m., Friendly Afternoon Tea.

7.45 p.m., Two Talks.

Monday (4/1/1960)—10 a.m., Opening of Congress (Photographer).

3.30 p.m., The Lord Mayor (Sir Archibald Park) will welcome delegates to Hobart.

7.45 p.m., Two Talks.

Tuesday (5/1/1960)—9 a.m., Seminar (Mr. K. Linton: "La Akuzativo")

10 a.m., Business Meeting.

2 p.m., Two Talks.

7.45 p.m., Harbour Cruise.

Wednesday (6/1/1960) — 9 a.m., Seminar (Mr. K. Linton: "La Refleksivo").

10 a.m., Business Meeting.

Afternoon, Half-day Outing.

7.45 p.m., Two Talks.

Thursday (7/1/1960)—9 a.m., Seminar (Mr. K. Linton: "Esperanta El-parolo").

10 a.m., Business Meeting.

2 p.m., Business Meeting.

7.45 p.m., International Concert.

Friday (8/1/1960)—9 a.m., Seminar (Mr. K. Linton: "Gramatika Mikspoto").

10 a.m., Business Meeting.

11 a.m., Close of Congress.

Free Afternoon.

7 p.m., Farewell Dinner.

Saturday (9/1/1960)—Full Day Outing.

U.E.A., S.A.T., A.E.A. and other Special Meetings will be held during one of the periods marked "Business Meeting".

Second List of Congress Members:

14. Mrs. E. M. Hill (Melbourne).
 15. Miss Lorna Samblebe (Melb.).
 - 16-17. Mr. and Mrs. Nightingale (Hobart).
 18. Miss D. Brimage (Hobart).
 19. Mr. K. G. Linton (Melbourne).
 20. Mr. Ralph Harry (Melbourne).
 21. Mr. Fritz Mueller-Sorau (Sydney)
 22. Mr. F. V. Taylor (Albury, N.S.W.).
 23. Mrs. F. V. Taylor (Albury, N.S.W.).
 24. Dr. R. G. Robbins (Canberra).
 25. Mr. I. T. Maddern (Moe, Vic.).
 26. Miss Marian Maddern (Moe, Vic.).
 27. Mr. V. Guetling (Sydney).
 28. Miss Freda Smith (Sydney).
 29. Mr. E. P. Crowe (Melbourne).
- Make your hotel reservation NOW as accommodation is limited!

KONGRESAJ PRELEGONTOJ



S-ro Ralph Harry:

(Komisiito por la Zamenhof Centjara Jubileo) prelegos pri: "Traduko de Aŭstraliaj Terminoj."



S-ro Ken Linton:

(UEA-Cefdelegito kaj AEA Kasisto) prelegos 4-foje en la Seminario kaj gvidos interesan Esperanto-Demandaron ("Quiz").

S-ro Fritz Mueller-Sorau: (Vic-Prez., Sydney E-Societo) prelegos pri "Ĉu vi konas . . .?" (Amuza petolado tra l'Esperanta vortaro).

D-ro Ross Robbins: (Prezidanto, Canberra E-Klubo) prelegos pri "Nov-Gvineo".

S-ro J. Matasin (Sydney) prelegos kun lumbildoj pri siaj vojaĝoj tra Eŭropo kaj Norda Afriko.

WORLD NEWS

RUMANIAN LINGUISTICS INSTITUTE RECOGNIZES ESPERANTO

Bucharest: The Institute of Linguistics in Rumania recently debated the question of the usefulness of Esperanto. At the conclusion the Council of the Institute unanimously recognized the usefulness of the spread of Esperanto and its establishment as an international means of communication. At the same time the Department of Linguistics and Literature at the Academy agreed on the usefulness of the International Language. Since the favourable resolution of the French Academy in 1924, several Academies and Linguistics Institutes (among them the

PRIME MINISTER MACMILLAN DID NOT REQUIRE TRANSLATION

Paris: Commenting on Prime Minister Macmillan's visit to Paris, influential newspaper "Le Monde" stressed the fact that, thanks to his knowing French, translation could be entirely dispensed with and matters to be discussed quite speedily disposed of. In our modern world, simple two-sided meetings without interpreters cause almost a sensation, while, by means of the International Language—Esperanto—thousands of people of dozens of nationalities meet together at Congresses and mutually understand each other without interpretation.

TWELFTH AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

3-9 January, 1960, at Hobart.

JOIN NOW and reserve accommodation. Congress fee 30/- (include at least £3 for hotel deposit). Visit beautiful Tasmania during the Esperanto Congress. Congress Secretary: Mrs. W. D. Shankley, 43 Victoria Esplanade, Bellerive, Tasmania.

Soviet and Rumanian) have shown themselves favourably disposed towards Esperanto.

BERNARD SHAW IN ESPERANTO

Warsaw: The Prague Theatre Troup, known as "Green Chariot", will, in August, present the three acts of Bernard Shaw's "Pygmalion" in Esperanto. The performance will take place in "Sala Kongresowa", the largest theatre in Warsaw. In the same week, The International Art Theatre of Paris, under the direction of S. Flego, will present in Esperanto, also in the capital city, Moliere's "Fouilles de Scapou" ("Frivolities of Scapou"). Although the greatest classics in the theatre world, among them Shakespeare, Goethe, Schiller, Goldoni and others, have already been played in Esperanto, this will be the first time that the great British Satirist is staged in the International Language.

MORE MUTE GAPING

The Russian farmers visiting the U.S., and the landmen in Iowa, had difficulty in understanding one another. We expected that. Two of the most difficult languages are Russian with its complicated grammar and words so different from the English; and English with its crazy spelling and pronunciation, and hair-fine nuances of meaning. It was a "look-see" all right; just that and nothing more. And so it will remain till in this mechanised era we get some horse sense to do what horses can do—understand each other.—F.R.B.

RIMRIĈO

En "British Esperantist", Aŭg. 1922, recenzanto de la rimvortaro de "Avoto" rimarkis, ke mankas al bulb', saŭc, dolĉ, ŝuld, fremd, pingl, film, simpl nenia kunrimo. Multaj radikoj havas nur unu-du kunrimaĵojn. Nun post 36 jaroj la afero preskaŭ tiel same statas—nur muld' aldoniĝis, por helpi.—F.R.B.

UNESKO RAPORTAS

La Hinda Sinteno Al Sij Popoletoj: Inter la loĝantaro de Hindujo troviĝas 20 milionoj, kiuj primitive ekzistas per ĉasado, fiŝkaptado aŭ simpla agrikulturo. La gentoj de suda Hindujo estas preskaŭ nomadoj. En centra Hindujo la gentoj havas vilaĝojn sed devas de tempo al tempo ŝanĝi siajn kampojn, kiam tiuj ĉesas estis fekundaj.

La hinda registaro celas protekti la gentan vivon, samtempe enkondukante al ili la plej bonajn avantaĝojn de la moderna civilizo. Tiucele la registaro instruas pli efikajn agrikulturajn metodojn al la triboj kaj malfermas metiolernejojn. En centra Hindujo la registaro redistribuis teron al kelkaj triboj.

La Ŝtataneco de Virino: Konvencio de la Unuiĝintaj Nacioj pri la ŝtataneco de edzinoj validas de pasinta aŭgusto. Edzino nun rajtas konservi sian ŝtatanecon, kiam ŝi edziniĝas aŭ ekdzedziniĝas aŭ kiam ŝia edzo ŝanĝas sian ŝtatanecon. Nov-Zelando subskribis la konvencion en julio. Britujo, Cejlono, Domenika Respubliko, Irlando, Izraelo, Kubo, Norvegujo kaj Svedujo jam ratifis aŭ akceptis ĝin.

“(Gi) havis en li . . . kasdirektoron en la kaso por la pensionitaj predikistoj”. — “Dia Regno”. Tradukite: . . . zorganton pri la kaso por pensiitaj predikistoj.

Kelkfoje venas leteroj al la redakcio, kiuj devus veni al la ekspedicio. Oni petas la redakcion pri malnovaj numeroj, sendas al ĝi abonojn, informas pri adresŝanĝoj k.t.p. Tiajn leterojn sendu al la ekspedicio. La redaktoro ne havas stokon da malnovaj ekzempleroj, nek administras la kason, nek konas la adresojn de la abonantoj. Li okupiĝas nur pri la **enhavo** de la gazeto. — Tiel laŭ “Norvega E-isto”. Tio aplikiĝas ankaŭ al ni.

Uzante “ekspedicio”, niaj norvegaj amikoj supozinde havas ĉe si aron da soldatoj aŭ ŝipoj malproksimlande militontan aŭ esplorontan! Almenaŭ ilia fideleco al la Plena Vortaro tion certigus.

Kinoaktoro William Holden faris eraron. Por eviti imposton, li devis la kompanion Columbia en kontrakti, ke ĝi pagu al li dek elcentojn de la malneta, t.e. entuta profito de la filmo “La Ponto super la Rivero Kvaj”, sed nepre po ne pli ol 50 mil dolaroj en ĉiu jaro.

Sed la filmo jam enspezis 8½ milionojn da dolaroj, kaj verŝajne enspezos ĝis 25 milionoj! Tial Holden, nun 40-jara, ne ricevos sian plenan pagon antaŭ ol li fariĝos pli ol 90-jara. Dume Columbia havas rajton disponi lian monon, investante fruktuzante ĝin po 90 mil dolaroj jare. — “Time.”

ESPERANTA BIBLIO.

Tre meritinda estas la simpla fakto, ke la Biblio estas tradukita en Esperanton; ankoraŭ pli meritinde, ke tiu traduko estas tiel tre bone farita. Multe da jaroj mi ekzamenadis pri la hebrea ĉe universitato. Tial mi bone scias, kiel malfacile estas, ekzakte traduki multajn el la hebreaĵoj vortoj. Mi ankaŭ scias, ke multaj hebrelingvaj tekstoj kaj terminoj restas ankoraŭ mallume kompreneblaj por Okcidentaj kaj Kristanaj homoj. Jam de longe mi ĉiutage estas studinta ĉapitron de la Esperanta Biblio, kaj mi ĉiam pli dankemiĝas, ke Esp-o ĝustatempe venis en mian vivon.

Mi kredas, ke neniam mi finis legon sen ricevi lumon sur ian frazon, vorton aŭ nuancon, kiun antaŭe mi ne komprenis. Mi certas, ke zorga legado de la Esp-a teksto estas pli valorinta al mi, ol konsultado ĉe multaj komentarioj.

Legantoj deziras scii: Kio estas la preciza senco de la originalo; kaj mi atestas, ke neniu anglalingva aŭ alia traduko tiel plenigis min per certeco, ke mi ricevis la efektivan esprimvolon de la inspirita aŭtoro, kiel mi ricevas, legante la Esp-an Biblion. La traduko de Zamenhof estas la plej kompakta kaj bona komentario pri la Malnova Testamento, kiu iam ajn venis en mian manojn. — Pastro J. Beveridge, Bakalaŭro de Teologio.

La plej detala kaj kompetenta artikolo pri la E-a Biblio estas de Dr. W. J. Downes en “International Language”, Okt. 1927.—Red.

The Australian Esperantist

("La Rondo")

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

N-ro 12 (92)

MELBURNO.

Okt. - Nov., 1959

70% OF THE WORLD'S SCIENTISTS DO NOT UNDERSTAND ENGLISH

Paris: The results of an enquiry by UNESCO concerning the language problem in science were published recently under the heading "Translation of Scientific and Technical Works and Other Aspects of the Language Problem". The report states that more than half of the world's scientists, through ignorance of language, do not understand one half of the world's scientific works. The table below shows the proportion between the languages utilized and the scientists who are familiar with them:

Language	Percentage of Scientific and Technical Literature in %	Percentage of Scientists who understand	Percentage of Scientists who do not understand
English	60%	30%	70%
German	10%	20%	80%
Russian	10%	13%	87%
French	10%	13%	87%
Spanish	2%	4%	96%
Japanese	2%	4%	96%
Other Languages	6%	1%	99%

ESPERANTO AND SCIENCE SUBJECT OF DEBATE IN HOLLAND

The Hague: "Wetenschap en Samenleving", Dutch Scientific Explorers' Association gazette, has published a discussion on the use of Esperanto in science. The debate was opened with an article by Messrs. M. Brouwer and G. J. Meinsma—"A-language, B-language or X-language"—which throws doubt on the "efficacy of Esperanto" and expresses the opinion that the use of national languages must be continued. Doctors C. P. Gunning, G. Hamming and P. Hartman responded with three articles ("A World Language is Needed by Science, Too"; "Language Pres-

sure, Esperanto and Machine Language"; "Esperanto as X-language"). These were followed by an article by Language Professor, Dr. Stutterheim—"Esperanto and Language Appreciation," an editorial and a final article by Dr. G. F. Makkink—"What Will Happen Now?" which emphasizes the urgency of the problem.

★ ★ ★

NATIVES IN AFRICA OPPOSED TO FRENCH LANGUAGE

Coquilhatville: "Lokole Lokiso", a paper published in the Cameroons, recently featured an article pleading for teaching in the mother tongue in African elementary schools. The article, written by Missionary Father P. Pichon, emphasizes that "it is

illogical, even stupid, to teach the first elements of knowledge in French. That method is contrary to the principles of education. One aims to teach African things familiar objects by unknown words. The educational system should be fundamentally reorganized. The elements of any subject whatsoever should be

taught in the child's original language and no foreign language forced on him before he is acquainted with a few elements of his own tongue." Discontent in Afro-Asian lands over the colonialistic pressure of the greater European languages is growing constantly.

★ ★ ★

Australia Kroniko

● **PERTH:** Nia Ligo suferis baton en tio, ke ni estis devigataj ankoraŭfoje trovi novan kunvenejon, ĉar oni baldaŭ forigis la konstruaĵojn "McNeil Chambers", por tie konstrui "nubskrapulon". Do, antaŭ kelkaj semajnoj ni translokiĝis al 62 Have-lock St. Nia nova hejmo estas malgranda sed komforta kaj niaj aŭtomobil-posedantoj trovas ĝin pli oportune lokita ol la malnova, ĉar iom for de la urbcentro.

En Majo, kiam ni estis ankoraŭ ĉe 9 Barrack-st., vizitis nin mallonge la komisiito pri la Zamenhofa Jaro, S-ro Ralph Harry. 12/5 li interese kaj instige alparolis ĉeestantaron kiu certe estus pli multnombra se ni estus ricevintaj pli longan antaŭanoncon pri lia vizito.

Ni daŭre prezentas "konversacian vesperon" en la unua jaŭdo de ĉiu monato. Gvidanto ĉe la Aprila kunveno estis D-ro Caldera kiu parolis kaj paroligis kun sia kutima vervo. La temo de Jack Hawks (majo) estis "La Decimala Sistemo", kaj tiu de F-ino Longson (Junio) estis "ŝatokujoj". Sub gvidado de S-ino G. Pollard (Julio) oni rakontis amuzajn travivaĵojn. Ĉe vigla diskuto kiun iniciatis S-ino Sedgley (6/8) pri la dezirindeco aŭ ne de antaŭ scio pri la estonteco, partoprenis ne nur nia S-ino Hutchison (pro okupateco malofta vizitanto), sed ankaŭ parlamentano-kolego S-ro F. Lavery kiu akompanis ŝin pro scivolo pri Esperanto. Li venu denove!

Ĉe la ordinara monata kunveno en Aprilo (9/4) F-ino D. Leach parolis kaj montris bildojn pri vizito kiun ŝi faris al tiu alloga insularo, Hawaii. Ĉe la maja kunveno (12/5) S-ino G. Le Coultre cedis la parolon al S-ro Harry. Ĉe la kunveno 9/7 ŝi parolis pri vizito al sia bela patrujo, Svislando. 11/6 S-ro H. McGrath por la

unua fojo alparolis la klubanojn, elektante kiel temon kuriozan sperton en aŭstralia dezerto. Ĉe la aŭgusta kunveno (13/8) S-ino R. Strassberg rakontis pri ferio kiun ŝi kaj la edzo freŝdate pasigis en Queensland.

Dufoje (Aprilo kaj Aŭgusto) ni faris publikan societian vesperon. Helpe de D-ro Einihovici kaj aliaj ni povis prezenti tre interesan kaj ĝuindan programon ambaŭfoje. Krom niaj propraj anoj kaj geamikoj ĉeestis reprezentantoj i.a. de Modern Language Teachers' Association, Bahai Movado kaj Dante Societo.

Pro tio ke nia senpaga kurso tre bone sukcesis (8 kursanoj aliĝis al daŭriga kurso sub gvidado de S-ino Pollard), ni starigis duan ĉe kiu F-ino A. Longson instruas, denove laŭ Ĉe-metodo.

Kelkaj anoj havis la plezuron renkonti Ges. Banham kiam ilia ŝiŝo vizitis Fremantle (25/4) survoje al Eŭropo. D-ro Caldera veturigis ilin por rapida ekvido de Perth kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.

Je la 16a de Julio la nacia radiostacio raportis pri la fakto ke la Okcident-Aŭstralia ŝtata turistoficejo reklamis en la Jarlibro de U.E.A.

D-ro Caldera, kiu faris centojn da operacioj antaŭ ol emeritiĝi de sia profesio, mem viktimiĝis al kuracista tranĉilaro antaŭ kelkaj semajnoj. Denove hejme, li kontentige refortiĝas.

Pro malsaneco nia Prezidanto, S-ro E. Walker jam de kelkaj monatoj ne povis partopreni al klubaj aferoj. Post pluraj semajnoj en hospitalo li estis dum kelka tempo en ripozejo. Oni raportas ke li grade resaniĝas, do ni esperas ke la ribelemaj kruroj baldaŭ konsentos porti lin al niaj kunvenoj.

Ankaŭ S-ro McGrath antaŭ nelonge pasigis monaton en kuracejo.

Ni ĝojas bonvenigi tre interesan anglan vizitanton, S-ino Hardaker el Burnley. Tre flua Esperantisto, ŝi rikoltis nian streĉan intereson, rakontante (13/8) pri renkontiĝo kun D-ro Zamenhof ĉe la Universala Kongreso ĉe Antverpeno en 1911. Ni esperas ke ŝi ofte partoprenos al klubaj aktivecoj antaŭ ol reveni al Anglujo je la jarfino.

O-A Esperanto-Ligo kunvenas la unuan, duan kaj 4an jaŭdon en monato je la 8a ĉe 62 Havelock St., W. Pertr. Telefono kaj oficejoj kiel en la Jubilea numero.—R.McG.

● **MELBOURNE:** Je 29a/7, S-ro E. McKenzie provis ĝindan dis-tradon solkante. Laŭ liaj klarigaj vortoj li elektis el Internacia Esperanto-Kantaro kantojn por reprezenti diversajn landojn, sed poste D-ro A. Fridenbergs provis montri la internaciecon de la kantoj.

La 5a/8 tre gravis por M.E.K., ĉar estis la vespero de nia ĉiujara mon-gajna merkato. Bedaŭrinde oni povus pli bone priskribi la veteron ol la kunvenon, ĉar estis okazo de pluv-ventego, kiam aŭtoritatuloj avertis la homojn foresti de la stratoj. Pro tio alvenis trege malmultaj gebravuloj (? malsaĝuloj), kiuj iom senespere laboris kaj vane atendis la kutimajn interesatojn. Malgraŭ ĉio, el ties malavara partoprenado de merkato, loterumoj ktp. rezultis tamen agrable surpriza profito: £14. Do, ne tute malkontente, se iom malgaje, la eta familia rondo fine kaj bonege regalis sin antaŭ ol disiri denove en la sen-kompanan nokton.

Per interesa kaj ŝercoplana rakonto de D-ro A. Fridenbergs pri "Aventuroj en Cara Rusujo post la 1-a Mondmilito" (12/8), informriĉa prelego de S-ino E. Hanks, kun belegaj kolorkliŝoj, pri arboj, birdoj kaj bestoj de Victorio (19/8), kaj "Esperantista Mikspoto" de S-ro H. Koppel (26/8), dum kiu li informis pri vizitonta Japana sciencisto, Prof. Egami, donis vojaĝraporton de S-ro Banram kaj tradukojn de maloftaj sed trafaj vortoj, kaj priskribis nuntempan vivadon en Kuweit laŭ raporto de tiea Egipta E-isto, forpasis tre agrable la restantaj kunvenoj de Aŭgusto.

RENDEVUO: En la julia kunveno de Rendevuo, S-ro Ralph Harry rakontis pri aŭstraliaj esploristoj. Li

resumis kelkajn esplorvojaĝojn, ekzemple la serĉon por trapasejo trans la Blua Montaro, kaj klarigis ke nia tuta scio pri la diversaj esploradoj kaj eltrovoj dependas de raportoj konservitaj en taglibroj de la esploristoj mem. Ĉar kelkaj estis pli bonaj verkistoj ol aliaj, nia scio pri ties aventuroj kompreneble estas pri detala. S-ro Harry opiniis, ke ĉi tiuj fruaj skribaĵoj konsistigas la komencon kaj bazon de nia aŭstralia literaturo.

Por la aŭgusta kunveno—la 200-a-la titolo de prelego de D-ro A. Fridenbergs estis "Malnova Grekujo", sed fakte, per skizo de la evoluo de la homa raso, li nur enkondukis la temon, kiun li daŭrigos poste.

Bonvolu noti: S-ino I. Fink, elektita Sekretariino (11/3), rezignis (11/7) pro premo de laboro. S-ro H. M. Cohen denove deĵoras portempe. F-ino Rita van Rijswijk estas koop-tita en estraron kiel bibliotekistinon.

● **HOBART:** En Marto, la 1-an, Dimanĉe, la Klubanoj kunvenis en la Kvakera Lernejo. Ni bonvenigis S-ron Nightingale, kiu estis reveninta el Anglujo kun sia edzino. S-ro Leereveld, nia Prezidanto, bone parolis pri la gramatiko. Estis decidite, ke venontaj kunvenoj estu ĉe la hejmo de Ges. Leereveld. Kongres-aferoj estis diskutitaj.

En Aprilo kaj Majo la geanoj okupigis pri Kongres-aferoj. En Junio, la 7-an, Dimanĉe, S-ro Leereveld parolis pri la partopioj. Sekvis amuzaj ludoj kaj babilado.

Ĉiuvendre, Ges. Leereveld gvidas klasojn en sia hejmo por komencantoj kaj progresintoj. Krom tio, S-ro Leereveld gvidas klasojn por gejunuloj en la Kvakera Lernejo.

Ni ĉiuj propagandas por la Kongreso, kaj nia Kongres-sek-ino, S-ino Shankley, forte laboras.

Venu amase por sukcesigi la Kongreson.—Aldo.

● **SYDNEY:** Nia grupo funkcias pli kaj pli aktive, kaj la aktiveco penetras en multajn suburbetojn.

En Julio S-ino Duncan invitis la klubanojn al sia hejmo en Manly por renkonti la lernantojn el sia klaso. Ni tre ĝuis la amikan posttagmezon, kiu certe helpis al pli firma interrilato inter la movado kaj la novuloj. La klaso havas proksimume 15 parto-

prenantojn, kaj bone progresas. Jam interesiĝis sufiĉaj aliaj personoj por komencigo de nova kurso en la Vesperlernejo.

Laŭ invito de S-ino Long, unu ano vizitis kunveneton en Mortlake kaj parolis al la gastoj pri Esperanto.

Inter la Klub-programoj dum Julio la plej interesa estis parolado de S-ino Grace Kirkwood pri Aŭstraliaj Birdoj.

S-ro Feldmayr havis la malagrablan taskon sciigi nin je la 29a de Julio pri la morto de nia estimata S-ro Les Pfahl. Dum longa tempo S-ro Pfahl estis pli malpli malsana, kaj lastatempe ripozis en hospitalo, kie li mortis. S-ro Pfahl faris multegon por la movado en Sydney, estinte dum jaroj la sekretario. Per interrilatoj inter la publiko, per gazet-artikoloj, radioparoladoj ktp. li varbadis konstante. Ankaŭ li estis Aŭstralia ĉefdelegito, kaj antaŭ nur kelkaj jaroj li pro malsaneco kaj laceco persvadis alian transpreni tiun laboron. Ni ne forgesu lin.

La unuan dimanĉon en Aŭgusto ni ĉiuj kamparaniĝis, irante al la terpeco de Edna Dash. Tie ni ĝuis la sunbrilon, iom laboris, kaj revis kun ŝi pri la farota laboro, kiam la dommeto fariĝos iom malpli sparta. Ni helpis per la bruligado de termit-detruita ligno—belega brulo! Ĝi estis ĝojiga okazo ankaŭ ĉar ni vidis ke Edna nun resaniĝis post sufiĉe longa malsano.

Tre interesan programon ni aŭdis de S-ro Noah (Chandler) je 10a de Aŭgusto. Li rakontis al ni kiel okazis, ke la Aŭstraliaj bestoj restas tiel strangaj kaj unikaj, kaj li priskribis iliajn kutimojn kaj strangecojn. Ĝi estis tre humora kaj faktoplena historio.

Vizitanto Johano Mnamu el Wellington, N.Z., venis al ni dum Aŭgusto, kaj li esprimis sin feliĉa trovi samideanojn en tiu ĉi fremda lando. S-ro Chandler veturigis nin al la Blua Montaro kaj aliaj vidindaĵoj, post kio ili pasigis agrablajn vesperon kun kelkaj samideanoj en la hejmo de Ges. Rutland.

Nia nelacigebla Samideano Fritz Mueller-Sorau faris prelegon en Januali, kaj nun li havas kurson tie, kun ses lernantoj. Ĝi estas esperplena grupo, kaj plua paŝo al divastigo de nia laboro.

Ni ŝuldas ankaŭ al Fritz belegan programon de "Uverturoj kaj Preludoj" en nia lunda kunveno.

Multaj personoj partoprenis nian reklam-konkurson, kaj pro skribo de 2000 vortoj pri "Kial mi volas Lerni Esperanton", ili rajtis komenci la lernadon je la 26a de Aŭgusto, en la "Linguacub". Ne ĉiuj povis ĉeesti, sed ni tamen gajnis ses novulojn. Ni estas tre dankemaj al la "Linguacub" pro uzo de ties ĉambraro por la klaso, kaj pro la kunlaboro kiun la estroj faris kun ni.—E.P.O.

● **BRISBANE:** La 10an de Majo mortis S-ro T. Suess, en la aĝo de 73 jaroj. Li estis Esp-isto de 1908 kaj estis Prezidanto de La Brisbane Societo dum multaj jaroj. En Julio re-anigis al la Societo malnova ano S-ro B. Cuvet. Li alportis al la kunveno sionsonbendaparton kaj surbendigis salutparolojn por sendi eksterlanden.

25an Aug. S-ro Cuvet denove alportis sian sionsonbendaparton, kaj aŭdigis salutparolon el Eŭropo.

La 28an Sept. ĝojigis nin bonvenigi D-ron F. Williams al nia Klubo, kiam, kun multe da intereso, ni aŭskultis lian paroladon en la kunveno. Tiun vesperon S-ro Cuvet denove metis je nia dispono sian sionbendilon, kaj ni aŭskultis salutparolojn el San Diego. Poste, la ĉeestantoj surbendigis parolojn responde, kaj D-ro Williams sendis salutojn kiujn li petis ke la ricevonto transdonu al eminentuloj en Los Angeles kiujn li renkontis antaŭ kelke da jaroj. Ankaŭ sendis salutojn, tre mallonge sed tre bonstile, F-ino Beth Lewis, lernanto de nia klubo kiu eklernis Esp'on antaŭ ses monatoj.

D-ro kaj S-ino Williams vizitis la hejmon de Ges-oj Grant ĉe Hamilton, kie la D-ro povis konstati la bonegan laboron kiun nia peranto kaj lia edzino faras pri la libroservo; ĉe Redcliffe ili estis tagmanĝaj gastoj de Ges-oj Norman Mills; kaj posttagmeze S-ino V. Fraser bonvenigis ilin al sia hejmo. Ili vizitis ankaŭ la hejmon de Ges-oj Parry ĉe Albion.

D-ro Williams konsentis al intervjuo de la "Brisbane Telegraph", post kio aperis la 26an de Oktobro portreto kun artikolo pri Esperanto. Rezulte de tio, nia klubo komencigis

novan kurson, al kiu aliĝis kvar personoj, kaj du, eble kvar, pluaj lernontoj aliĝos post du semajnoj. S-ino Grant estas la instruisto.

La 5an Okt. vizitis la delegiton S-ro Conrad Ivetfjall, juna sveda Esperantisto, kiu loĝas en Sydney. S-ino Parry kaj Rolf Ahrens veturigis lin al Redcliffe kie S-ino Fraser gastigis lin ĉe sia marborda hejmo.—S.L.P.

NIA REDAKTORO RAPORTAS

El Aŭstralio mi vizitis Anglujon post 45-jara foresto. Mi trovis la karan kamparon preskaŭ senŝanĝa kaj intime belimpresa. Ankoraŭ staras kverkoj (sur la bieno de onklo) sub kies branĉoj mi ludis kiel knabeto; mi gapiis, benate en rememoroj, ia domon en kiu mi naskiĝis antaŭ 61 jaroj. Stranga sperto estas: reiri al la malnovaj vojoj de la petolema juneco. Por ricevi efike-ĝustan impreson, tio postulas konscie energian pelon al mia tro flegma spirito. Malfacile estas, alpreni kun anima profito, la lecionojn haveblajn per tia reveno en la pasintecon—al la nuaj etapoj de nia vee mallonga vivo.

La generacio tiam konita de mi preskaŭ tute formortis sed mi ĝoje povis revidi kelkajn personojn, kiuj amis min onkline kiel infanon, kaj iliaj gefiloj gastigis min kun dolĉa parenceco.

Mi jam multe veturis en la amata nasklando—oriente, sude kaj okcidenti, tra graflandoj Kent, Surrey, Suffolk, Norfolk, Warwickshire, Dorset, Devon, kaj kompreneble Londono. S-ro Bolton (del. U.E.A.) en Dorchester regalis min per sia konversacio dum temanga vespero. S-ro M. C. Butler same faris dum neforges-ebla horo en Kingston en sia domkaverno da libroj lerte sliptaj laŭ decimala sistemo. Pacienciga dediĉito al nia afero, li pene laboradas kontraŭ ĉiaj malfaciloj, fidante, ke lia laboro ne vaniĝos, kaj ke siatempe alia persono plu daŭrigos lian gravan taskon bibliografian kaj vortar-kompilan.

El mia Eŭropa vojaĝo mi ricevis inspiron, kiu certe efikos sur mian laboron por Esperanto. Urboj kaj lokoj, kiuj antaŭe estis por mi nur nomoj, de nun estos plenaj de signifo reala. Ĉe rilatoj kun homoj mi mem amare spertis embarason por la lingva

diverseco, sentante vualitajn rikanojn de neangloj, kiuj, parolante la Anglan, petis min ne plu balbuti la Germanan. (Sciuj, ke mi nur volis ne riski ofendon trudi la propran lingvon sur fremdan oreilon—sed vane mi celis "ĝentil."i Kiom ankoraŭ pli multe devis suferi D-ro Zamenhof en Bjelostok en lingvomedio multe pli akute flamiĝema!)

Espereble mi estas jam pli hominda homo ĝuste pro mia Eŭropa rondvido, ĉar mi estas sente stimulita per pli vasta interkonigo kun samteranoj, kies vivmedioj kaj pensintenoj postulas apartan penon al simpatio. Por atingi ĝin oni devas funde sinekzameni kaj larĝigi la spiriton, penante trovi la sekretojn de la grandaj komprenantoj pri la "frata homo".

Mi intencas reiri en Aŭstralian je la 10 Oktobro. Saluton al ĉiuj amikoj.—F. R. BANHAM.

NI GARDU LA FUNDAMENTON

En la Maj-Junia numero de "Franca Esperantisto" S-ro Paul Ciliga en treege interesa artikolo citis vortojn, kiuj enfokusigis problemon aktualan en la jaro 1909, kaj kiu estas ankoraŭ aktuala post kvindek jaroj.

Post la apero de la Unua Oficiala Aldono Prof. Carlo Bourlet, mirigita pro la tiama nealprenado de **diplomati**, trovebla en la Ekzercaro, rimarkigis en "La Revuo" (N-ro 37, Sept., 1909), ke "oni akceptas **geografi**, **geologi**, **geometri**, k.c.>"; kaj li prave demandis "ĉu per la dirita analogio ni rajtas uzi **geograf**, **geolog**, kaj **geometr**?" (Nun, jes, ĉar **geolog** oficialiĝis en 1922, kaj la aliaj en 1958). Li daŭrigis: "Se la Akademio, anstataŭ hazarde oficialigi izolajn vortojn, farus pli profundan laboron por studi la seriojn, ĉu ĝi ekzemple akceptus la vorton **federacio**? Eble pripensado montrus al ĝi, ke la verbo **federi**, jam ofte uzata, ebligus pli facilajn kaj pli simplajn devenajn vortojn? **federi**, **federalo**, **federa**, **federe**." Tiu saĝa konsilo, ho ve, restis senha, kvankam radikoj mallongaj, senbalastigitaj de pezaj pseŭdosufiksoj estas certe pli facile kaj pli agrable uzeblaj; **aboli**, **apelo**, **koment**, **proleta**, **sponsitana** estas evidente preferindaj.

Entuziasme mi deziras subteni la rimarkojn de S-ro Paul Ciliga. Per

la enkonduko de izolaj vortoj, sen sufiĉa atento al nia mirinda sistemo de afiksoj, la fundamento estas nepre daŭre minacata. Se ni atentus tamen serion da vortoj, ĉu povus ekzisti tia serio, kia **redakti, redakcio, redaktoro?**

S-ro John Warden ĉi tion antaŭvidis en la jaro 1915, kiam li verkis la enkondukon al la Edinburga Poŝvortaro, kie li diris: "Kie eble, sek-vante la ĝeneralan spiriton de la lingvo, la radikoj estas uzita por la verba ideo, prefere al la substantiva aŭ adjektiva ideo. Tiel estos trovita **deklina anstataŭ deklinaĵo, komento por komentario, kondol por kondolenc**, k.t.p. Kie pli simplaj radikoj estas aprobitaj, aŭ jam venis en komunan uzadon—ekzemple **bank kaj inspekt**, de kiuj nature sekvas laŭ Regulo 15 **bankisto kaj inspektisto**—la pli malnovaj formoj, kiaj **bankiero kaj inspektoro** estas jam ne necesaj."

Tiel pensis S-ro John Warden kaj Prof. Carlo Bourlet, sed kiom da progreso ni faris dum la pasintaj kvindek jaroj? Ni ankoraŭ vidas la arkaismojn, kiaj **bankiero kaj inspektoro**. Ni an koraŭ legas la vorton **administracio**, demandante al ni, ĉu la signifo estas **administrado, administristo, aŭ administrantaro?** Kiel ofte ni vidas tiajn malbelajojn, kiaj **navigacii, ekskluzivi, kaj apelacii**, anstataŭ simple **navigi, ekskludi, kaj apeli**.

Nur lastatempe mi legis tre pravan kritikon fare de S-ro Montague Butler kontraŭ la enkonduko de la substantivo **dumpingo** anstataŭ la verbo **dumpi**, el kiu ni povus fari la derivaĵojn **dumpado, dumpaĵo, kaj dumpisto**. Mi rimarkis, ke la nove eldonita "Scienca kaj Teknika Terminaro" konsentas kun li. Ĝi ankaŭ enlistigas la verbon **adheri**, kaj mi ĝojas raporti, ke mi vane serĉis tiajn pseŭdoradikojn, kiaj **adhezio, adherenco, kaj adheziva**.

Nia nuna **intendant**o ne povas **intendi**, nur ĉar ni enkondukis la substantivon anstataŭ la verbon. Se nur ni povus anstataŭi la malfeliĉan konstruan terminon **turo** per alia pli konsilinda vorto, ne ebligus al la kompatinda **turisto** simple **turi** sen la neceso, ke li aspektu kiel specialisto pri altaj malvastaj konstruaĵoj. Tre povus esti, ke la Akademio devos kuraĝe eljeti fundamentan vorton por

konservi pli gravan fundamentan principon.

Jes, forte subtenante la rimarkojn de S-ro Ciliga, mi reehas la konkludojn de Prof. Carlo Bourlet el la jaro 1909, kiam li diris, ke "**la metodo de la blua kraĵono** ne sufiĉas; de la Akademio ni esperas, ke, unue, ĝi donos al ni ne izolajn vortojn, sed seriojn da vortoj zorge pripensitaj kaj studitaj por atingi la plej grandan internaciecon, simplecon kaj oportunecon . . . ; due, ĝi donos al ni, se ne leĝojn aŭ regulojn, almenaŭ bonajn konsilojn pri la plej taŭga maniero por esperantigi naciajn vortojn".

Nun urĝas, ke ni agu laŭ la saĝa konsilo de nia eminenta franca esperantologo, kiu tiel intime konis la menson de la Majstro. Li tion meritis antaŭ kvindek jaroj.

—KEN G. LINTON.

UNESKO RAPORTAS

Oklingva Glosaro Pri La Elektrotekniko: La Internacia Elektroteknika Komisiono en Genevo eldonos novan oklingvan vortaron, kiu interesus elektroteknikajn fakulojn. Unesko kaj la Internacia Atomenergia Agentejo finance kontribuos al la parto de la verko, kiu pritraktas atomegan elektroteknikon.

Spertuloj unue difinos per la angla kaj franca lingvoj la precizan signifon de la terminoj, kaj tiuj difinoj siavice servos kiel bazo por estigi la ekvivalentajn terminojn en aliaj lingvoj.

Malfermo De Skandinavia Hospitalo en Koreo: Komence de Oktobro en Seoul, Koreo, oni malfermis 465-litan hospitalon rekonstruitan kaj ekipitan tute per mono el Danlando, Norvegujo kaj Svedujo por inter aliaj celoj eduki kuracist(in)ojn kaj flegist(in)ojn. Oni bezonis ĉirkaŭ 6,000,000 da usonaj dolaroj por kompletigi la hospitalon, kiu estas la plej moderna siaspece en sia regiono. 70% de la pacientoj ricevos senpagan kuracadon.

Lingvolernejo Por Turistoj: Multaj turistoj, kiuj pasintomere vizitis Izraelon, partoprenis unikan edukatan eksperimenton. Alveninte ili ĉeestis unusemajnan hebrean konversacion kurson, kiu provizis al ili aron de inter 400 kaj 500 vortoj por helpi ilin pli profiti per sia vizito.

La Hebrea Universitato en Jerusalemo organizis la kursojn, kaj la instruantoj estis studentoj, kiuj mem partoprenis unusemajnan intensan kurson pri metodoj instrui la hebrean lingvon.

Orienta-Okcidenta Semajno en Pollando: La Pola Nacia Komisiono por Unesko organizis en Oktobro specialan orientan - okcidentan semajnon

por pligrandigi scion kaj komprenon pri la Oriento. La fokuso de la kampanjo estis ekspozicio pri 'La Evoluo de la Orienta Skribo kaj la Orienta Libro', kiun la Nacia Muzeo en Varsovio aranĝis. Por la ekspozicio oni petis la helpon de la Naciaj Komisionoj por Unesko en 17 landoj, pruntante librojn kiel ankaŭ filmojn pri la popola vivo, historio kaj kulturo.

TWELFTH AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

3-9 January, 1960, at Hobart.

JOIN NOW and reserve accommodation. Congress fee 30/- (include at least £3 for hotel deposit). Visit beautiful Tasmania during the Esperanto Congress. Congress Secretary: Mrs. W. D. Shankley, 43 Victoria Esplanade, Bellerive, Tasmania.

ZAMENHOF FUND

7th JUBILEE HONOUR LIST

Mr. & Mrs. G. A. Grant (Brisbane)	£5 0 0
Mr. Ralph Harry (Melb.)	2 15 3
Mr. K. J. Hirschel (Melbourne)	2 2 0
Mr. V. Vengerov (Sydney)	1 0 0
Esperanto Class, Manly (N.S.W.), per Mrs. M. Duncan	1 0 0
Mrs. P. Byatt (Berwick, Vic.)	10 0

	£12 7 3
Previously acknowledged	716 11 6

TOTAL	£728 18 9

Many thanks to all. Donors who have contributed to date may feel proud of this splendid achievement. If all those who are still considering would make their contribution now, this total could be raised to £1,000 by the end of Zamenhof Year.

ESPERANTO CO-OPERATIVE FORMED

On October 3rd the Foundation meeting of the "Esperanto Advancement Co-operative Limited" took place. Shares for £300 were subscribed and a further £1,500 will be made available for the purchase of a suitable property as soon as one has been chosen.

This new Co-operative was officially incorporated on October 16th by the

Registrar of Co-operative Societies in Victoria. All Esperantists are invited to join and those purchasing shares before the end of 1959 will be considered foundation members. Application for shares may be made to The Secretary, Esperanto Advancement Co-operative Ltd., 41 Byfield Street, Reservoir, N.19, Victoria.

AGENTS OF A.E.A. BOOK SERVICE

N.S.W.:

Miss Edna Dash,
26 Edgeware Road,
ENMORE, N.S.W.

Canberra:

Mr. S. Fulop,
26 Bundella Street,
NARRABUNDAH, CANBERRA,
A.C.T.

Victoria:

Mrs. J. Milligan,
274 Mont Albert Road,
SURREY HILLS, MELB.

Tasmania:

Mrs. H. Cooper,
9 St. George's Terrace,
HOBART.

Southern Australia:

Miss W. Addis,
25 Greville Avenue,
Flinders Park,
ADELAIDE.

Western Australia:

Mrs. A. B. Sedgley,
123 Gregory Street,
Wembley Park,
PERTH.

12th AUSTRALIAN
ESPERANTO CONGRESS

3-9 January, 1960, Hobart, Tas.
Secretary, Mrs. W. D. Shankley, 43
Victoria Esplanade, Bellerive, Tas.

Third List of Congress Members:

30. Mr. S. H. Grant (Port Lincoln, S.A.)
31. Mr. D. Guilbert (Hobart)
32. Mr. K. Roberts (Hobart)
33. Mrs. M. Thomas (Sydney)
34. Miss Edna Dash (Sydney)
35. Mr. Frank Dash (Sydney)
36. Miss P. Ferguson (Sydney)
37. Mr. Doug. Brown (Sydney)
38. Miss A. Curtis (Beenleigh, Qld.)
39. Mr. Ruth McGrath (Perth)
40. Mrs. O. Glenie (Melbourne)
41. Mr. J. Matasin (Sydney)
42. Mrs. J. Matasin (Sydney)

We are pleased to announce that Mr. J. Matasin, having just returned from his overseas trip, will give four lectures (with coloured slides): (1) Across the United States; (2) Through Southern Europe (Yugoslavia, Italy, Spain, Portugal); (3) Through Germany and Scandinavia; (4) Across Asia to India (Turkey, Persia, India, Ceylon).

**ZAMENHOF
CENTENARY CONCERT**

Y.W.C.A. Memorial Hall,
60 Russell St., Melbourne,
Tuesday, 15th December, 1959,
at 8 p.m.

In commemoration of the birth of
Dr. L. L. Zamenof

Author of Esperanto

on 15th December, 1859.

Admission by Invitation only.

(Phone your reservations to
JA 3483 or JM 1215.)

JA VERE

Fantom-rajdanto.—En Fulton (Kentucky) viro demandis pri ir-revena fervoja bileto por la kadavro de sia frato. Al la skuita staciisto li klarigis, ke liaj parencoj en Seattle konvinkis lin, ke li povas sendi la kadavron al Seattle pli malkare ol ili povus fervojiri al Kentucky.

Sanĝo de A.E.A. Regularo.

Laŭ Paragrafo 19 de la A.E.A. Regularo mi proponas sanĝon de ĉi-tiu regularo dum la 12-a Aŭstralia E-Kongreso en Hobarto. La proponata nova regularo, ellaborita de s-ro Ralph Harry, laŭ sugestoj de sub-komitato elektita ĉe la 11-a kongreso en Melbourne, estos haveblaj por ĉiuj AEA-membroj kontraŭ reafranko (9d.).

—Herbert Koppel, AEA Sekretario.

11th AUSTRALIAN
ESPERANTO CONGRESS

(Melbourne, 1958)

Statement of Receipts and
Expenditure.

RECEIPTS

Congress Fees	£132 15 0
Donations	55 8 6
Sale of Souvenirs (Photos, Postcards, Badges)	30 15 0
Welcome Dinner	43 7 6
Accommodation	44 17 0
Concert	34 4 9
Excursions	48 5 0
Profit of Theatre Party (arranged by Melb. Esp. Club)	6 10 0
	<hr/>
	£396 2 9

EXPENDITURE

Y.C.W.A. Hall (rent)	£55 0 0
Printing	18 11 5
Cost of Souvenirs (Photos, Postcards, Badges)	16 17 11
Welcome Dinner	38 17 6
Accommodation	44 5 6
Concert	35 14 0
Excursions	31 7 0
Postage, Bank Exch., etc.	4 7 5
Musicians (for Congress Opening)	6 6 0
Prizes for Literary Comp.	8 8 0
Sound Tapes	4 15 6
Exhibition	12 6
Part Balance to A.E.A.	65 10 0
Part Balance to Melb. Esp. Club	65 10 0
	<hr/>
	£396 2 9